

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
97-a jaro • n-ro 1168 (3) • **Marto 2004**

Israelaj esperantistoj kunvenis en kibuco



**Laŭdado de
komuna prudento**

**Tradukmaŝinoj
kaj tradukmemoroj**

**Ĉu Esperanto
floras en Afriko?**

**Tute normala
progreso II.**

**Ĉu la movado
malbonfartas?**

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎, ✉ +421 43 4222 788
✉ revuo@uea.org; revuo@stonline.sk

Aperas:

ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voclegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 34); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,00.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL24PSTB0000378964 SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA0426051599 SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkarto:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

☎ +31-10-436-1044, ✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele.



Enhavo

- 51 Malferme: Babiloj kurzas nule aŭ Laŭdado de komuna prudento (Renato Corsetti).
- 52 Ĉu Esperanto floras en Afriko? Virunga klubo serĉas leteramikojn. Ankaŭ kilibanoj emus korespondi.
- 53 En Benino ĉio iras glate. Ĉu granda centro en Goma?
- 54 Braza Centro seminariis. Kalimba en Kongolando. Rondvojaĝo tra Togolando. UTE en Togolando.
- 55 Bona espero en Suda Afriko. Jubilea festo en Kinŝaso. Juna bando en Niĝerlando. Seti Dismas. Verda Maro en Niĝerio.
- 56 Bona tradukmaŝino baziĝas sur tradukmemoro (Toon Witkam).
- 57 Kalendaro
- 60 Tute normala progreso II. (fino). (Claude Piron).
- 62 La aprila Malferma Tago. La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK).
- 63 RECENZOJ: Yamasaki Seikō pri *Konciza etimologia vortaro*.
- 64 Efthimios Mavrogeorgiadis pri *Litovio dum jarcentoj*. Ulrich Lins pri *La Zamenhof-strato*.
- 65 LASTE APERIS.
- 66 La pekina UK komenciĝos denove per kleriga dimanĉo (Humphrey Tonkin). LOKE.
- 67 FAKE. OFICIALA INFORMILO.
- 68 TRA LA MONDO: Raporto pri Esperanto-agado dum la Monda Socia Forumo en Barato (D-ro A. Giridhar Rao).
- 69 Ĉu la movado malbonfartas? (Claude Nourmont).
- 70 FORPASOJ. KRUCENIGMA KONKURSO.

KOVRILPAĜE: Jam la kvaran fojon Esperanto-Ligo en Israelo okazigas tutlandan dutagan E-renkontiĝon. Tiuj kunvenoj, kiuj ricevis la nomon KIES (Komuna Israela Esperantista Semajnofino) okazis en antaŭaj lastaj jaroj en la suda urbo Arad, en Haifo (apud la Bahaa templo) kaj en Masado ĉe la Morta Maro. Ĉi-foje la kunveno okazis la 23-24.1.2004 en la feri-vilaĝo de kibuco Maagan, ĉe la Tiberiada Lago. Partoprenis 37 personoj, el tre variaj aggrupoj: gejunuloj kaj veteranoj, kiel komencantoj kaj lingve-spertaj multjaraj esperantistoj, kiuj ĝuis komunan harmonian etoson. Dum la kunveno okazis efektiva reta kontakto inter la partoprenantoj surloke kaj esperantistoj en Israelo kaj la tuta mondo (per la esperantaj retaj forumoj *Tapuz* kaj *Ĝangalo*). La kunveno estis organizita de Nava Cinori kaj la klerigan programon gvidis Amri Wandel, kiu samtempe festis sian 50-jaran datrevenon. La redakcio sincere gratulas la jubileanton!

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (strategio kaj planado): d-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ✉ renato@esperanto.org.
Vicprezidanto (kulturo, esploro kaj dokumentado): prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford CT 06107, Usono; ☎ +1-860-561-26-69 [h]; ✉ +1-860-561-52-19 [h]; ☎ +1-860-768-44-48 [of]; ✉ +1-860-768-44-11 [of]; ✉ tonkin@mail.hartford.edu.
Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎ +82-53-765-0880 [h]; +82-53-652-4488 [of]; ✉ +82-53-652-8141 [of]; +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.
Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjoj): s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split, Kroatio; ☎ +385-(0)21-535-650 [h]; +385-(0)21-355-550 [of]; ✉ +385-(0)21-393-597 [of]; ✉ osibov@pravst.hr.
Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎ / ✉ +31-(0)20-642-18-53; ✉ ans.bakker@esperanto.org.
Eduko, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado: s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-227-21-17; ✉ esp.togo@cafe.tg.
Informado, rilatoj kun TEJO: s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Ŝumerĵa, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎ +7/83336/59856; ✉ volg@uea.org.
Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ✉ michela.lipari@esperanto.org.
Observanto de TEJO: Sonja Petrović.
Observanto de ILEI: Radicaĵa Petrović.

Babiloj kurzas nule aŭ Laŭdado de komuna prudento

Renato Corsetti

La unua duono de la titolo estas mallerta provo traduki tre sukan italan esprimon, kies senco estas, ke babiloj kostas neniom, ke ili estas libere doneblaj kaj libere riceveblaj. Tio, kio gravas, estas faktoj. Kial mi fiŝkaptis tiun italan esprimon? Simple por komenti la multajn, vere multajn babilojn, kiuj lastatempe diskuris pri la ŝanĝoj en la personaro de la Centra Oficejo. Kiam vi havos ĉi tiun revuon en la manoj, eble restos ankoraŭ malmultaj tagoj de deĵorado por la nuna Ĝenerala Direktoro, Trevor Steele, kaj malmultaj tagoj por la reenoficiigo de la eksa kaj nun mal-eksa Ĝenerala Direktoro, Osmo Buller.

Laŭ la tradicioj de ia okcidenta ĵurnalismo pluraj provis legi ĉi tiun fakton en amaso da manieroj kaj trovi profundajn signifojn, kaj fari antaŭvidojn por la estonteco, kaj antaŭvidi renversojn kaj movojn. Ĝenerale ne temis pri tre seriozaj supozoj, ĉar ili tute ne tuŝis la esencan laboron sed limiĝis al cerbumado pri homoj, kaj ĉambroj kaj skribotabloj. Mi diru nun, el mia vidpunkto, ke ĉiuj laborantoj por UEA kaj en la Centra Oficejo kaj en la mondo estas same valoraj. Provoj kontraŭstarigi la unujn (kiel dirus Zamenhof) kontraŭ la aliaj estas vanaj kaj senbazaj. En ĉi tiu okazo estas granda ĝojo por mi publike antaŭ la membroj danki la forirantan Ĝeneralan Direktoron, pro tio kion en malfacilaj kondiĉoj li sukcesis fari en la pasintaj jaroj, kaj danki la revenantan Ĝeneralan Direktoron pro tio, ke li revenas. Cetere mi malkaŝu al vi sekreton, kiun liberaj babilantoj ne imagas: en ĉi tiuj jaroj la du Ĝeneralaj Direktoroj bonege kunlaboris inter si.

Nun, kiam eĉ la spuroj de personaj kvereloj malaperis, ni dediĉu nin al la vera laboro, pro kiu ni rajtas kun fiero rigardi niajn neesperantistajn primokantojn, kaj la ceterajn favorantojn de perfortaj solvoj de lingvaj problemoj, al la disvastigo de Esperanto kaj de ties kulturo.

Parolante pri laboro ni venas nun al la dua duono de la titolo. Eble ne ĉiuj scias, kaj fakte la afero estas sufiĉe persona, ke antaŭ ol labori en universitato mi laboris en banko kaj okupiĝis pri organizado, komputiloj ktp. En tiu funkcio foje mi parolis kun supera direktoro de komputila firmao, kaj la parolado estis pri salajroj de dungitoj. La konkludo estis ke ne la plej gravaj infor-

madikaj inĝenieroj ricevas la plej altajn salajrojn, sed simple homoj, kiuj posedas komunan prudenton. Tiuj iĝas la gravuloj en entreprenoj. Fakte superajn teknikistojn oni facile trovas sed homojn kun komuna prudento multe pli malfacile.

Ankaŭ ni en la movado bezonas amaseton da komuna prudento por antaŭenigi nian aferon kaj amaseton da toleremo. Daŭre mi aŭdas akrajn voĉojn de homoj, kiuj krie kaj ade asertas sian vidpunkton, ekzemple: *Esperanto venkos nur se ĉiuj esperantistoj mastrumos malgrandajn hotelojn por turistoj aŭ Nur la originala literaturo estos nia atuto aŭ Nur la tradukita literaturo valoras aŭ eĉ La problemoj estas ke la mondo neniam akceptos Esperanton dum ne ĉiuj adverboj finiĝas per e*, aŭ fine, sed vi ĉiuj konas multe pli da ekzemploj, *Por Esperanto nur Pekino gravas aŭ nur suda Brazilo gravas. La cetera mondo sekvos*. Nun, ankaŭ se estas en ĉiuj tiuj asertoj part(et)o da vero, oni devas je la lumo de komuna prudento pritaksi ilin kaj precipe siajn proprajn asertojn, kaj fariĝi pli larĝvida kaj pli tolerema. Neniu el ni scias vere, kiu estas la magia formulo por triumfigi Esperanton tuj kaj senpene. Mi mem tre volonte konfesas tion. Eble ni ĉiuj agnosku tion, kaj iĝu pli modestaj. Partaj venketoj estas eblaj kaj multaj el ni scias kiel atingi ilin, sed neniuj perdis la senton pri la rilato inter vero kaj deziro.

Kaj parolante pri laboro, ni restu ĉe laboro por Esperanto. Lastatempe mi aŭdas laŭtajn kriojn, sed tre malmulte da mallaŭtaj sinanoncoj por iĝi komisiito de UEA kaj labori por difinita kampo. Niaj lastaj komisiitoj estis grandparte, vere grandparte, trovitaj nur ekster Eŭropo, en Brazilo, en Ĉinio ktp. Mi ne volas eltiri tro rapidajn konkludojn el tio, eble tio signifas nur ke eŭropanoj faras pli multe en aliaj kampoj kaj

ke la tradiciaj laboroj ne tre altiras ilin (cetere la francaj esperantistoj, ekzemple, faras vere multon. Se vi serĉas landan asocion por imiti, rigardu ĝin.). Sed nun ni serĉas komisiitojn pri tre gravaj kampoj (de la Enkonduko de Esperanto en Aviadon al la reformatoj de la projekto Indigenaj Dialogoj, ktp, ktp, ktp).

Se vi havas komunan prudenton kaj ne ŝatas babilojn, kontaktu min. La Esperanto-movado bezonas vin.

Renato Corsetti



Ĉu Esperanto floras en Afriko?



Partoprenantoj de la "Esperanta Minikongreso"
en Soweto, dum ekskurso en la loka botanika ĝardeno.

Virunga klubo serĉas leteramikojn

Virunga Esperanto-Klubo aktivas en Rutshuru-distrikto en nord-orienta Kongolando. En la regiono estas kelkaj aktivaj esperantistoj, kiuj fondis klubojn kaj volas uzi sian scion de Esperanto, sed ne estas facile trovi geamikojn en la mondo. La klubo estas tre aktiva. Ĝi varbas novajn membrojn por anstataŭi tiujn, kiuj migras al la urbo Goma por serĉi tie laboron. Tie ili ankaŭ fondis Esperanto-klubon de Goma.

La klubo luis ĉambregon per \$10 monate. Por instruado ĝi fotokopiiis la kurson Fere kaj pagis \$60 por dek serioj. Du skatoletoj kun kreto kostis \$5. La membroj kontribuas ĉiumonatan kotizon de \$20. Tiel ili sukcesas agi.

Tri novaj esperantistoj serĉas leteramikojn: Drosele Bavuna (naskiĝis en 1960), Kambere Kasongo (1978) kaj Ndungutse Vicent (1962). Ilia poŝta adreso estas: poŝtkesto 219, Kisoro, Ugando. La poŝto de Ugando funkcias pli bone ol tiu de Kongolando. Tial oni luas poŝtkeston en Ugando kaj tie prenas la leterojn. La klubo ne havas retadreson.

Ankaŭ kilibanoj emus korespondi

Esperanto-klubo de Kiliba (Orienta Kongolando) estas fondita en 1989 de Namutema Wabasobe Athanase. La klubo tiam havis 40 anojn. Ĝi fondis bibliotekon. Pro la senfina militado iuj rifuĝis eksterlanden. Nun la klubo havas 20

Tradicie, kluboj kaj
asocioj en Afriko
raportas jarfine al
la Afrika Oficejo
pri la pasinta jaro.

Krom finance,
ankaŭ vorte.

Jen mozaiko da
informoj pri la vivo
kaj klopodoj de
niaj samideanoj
sur la nigra
kontinento.

membrojn, kiuj kunvenas ĉiusemajne. Ili deziras regulan kontakton kun ĝemela klubo ie ajn en la mondo. La klubo servas al ĉirkaŭaj kluboj kaj grupoj: en Kavimvira, Kalimba, Kimanga, Ndunda, Lemera, Tanganika, Uvira, E-grupo de la Sukerfabriko. La prezidanto Namutema Wabasobe kaj sekretario Rutibaza Kwangabire Philippe instruas ankaŭ en lernejo en Uvira. Kelkfoje semajne unu el ili biciklas al Uvira (17 km) per biciklo donacita de UEA, kiu iam difektiĝas sur la malbonaj vojoj (kaj la mono por riparo ne estas). Mankas ankaŭ sapo (bona instruisto devas lavi sin kaj siajn vestaĵojn antaŭ ol aperi en la klaso), banano (por ne malsati tro dum tiu tago de forestado), pluvombrelo (por ne alveni malseka en pluva sezono), petrolo (por vespere korekti taskojn kaj prepari lecionojn). En 2003 UEA disponigis \$50 por ĉiuj kluboj menciitaj. Finstudis en 2003 la korespondan kurson kaj ricevis diplomon: Namutema Wabasobe, Rutibaza Kwangabire Philippe, Michael Muyirike, f-ino Mado Ndandwe, Kashando Buregeya.

La klubo bezonas korespondantojn (ĝemelajn klubojn), lernilojn kaj vortarojn, gazetojn en facila Esperanto, iom da mono por poŝtmarkoj kaj por la kosto de la instruisto.

La adreso: Namutema Wabasobe Athanase (prezidanto) aŭ Rutibaza Kwangabire Philippe (sekretario), c/o Paroisse Ste Marie de Kavimvira, B.P.500, Bujumbura, Burundio. (La adreso estas en la najbara lando Burundio, ĉar la poŝto en Burundio funkcias pli bone ol tiu en Kongolando.)



En Benino ĉio iras glate

Benina Esperanto-Federacio relanĉis sian agadon, renovigante la estraron dum la ĝenerala asembleo en Cotonou, la 1-an de februaro 2003. Ĝi kunvenis trifoje dum la jaro. La korespondado inter BEF kaj la Afrika Oficejo de UEA en la najbara Togolando iris tre glate. Franca samideano Madeleine Crepatte vizitis la lernejojn en Codji, kie Esperanto estas enkondukita, sed pro transbordiĝo de la rivero Mono Madeleine ne vizitis alian lernejojn en Aguidahoue. En la norda urbo Parakou S. Sylvestre fondis novan klubon. BEF sukcesis organizi someran kurson en aŭgusto, kiun gvidis Gbadamassi Latifou, estis dissendita radiokurso (kurso de SAT-Amikaro) kaj organizitaj radio-ludoj por novaj esperantistoj. BEF premiis la gajnintojn. La ĝenerala sekretario interkonsentis kun la loka radio en Lokossa ke ili estu partneroj por diskonigi la lingvon en la regiono de Lokossa.

En 2003 BEF ricevis subvencion de UEA de 200 eŭroj kaj de la mecenato Martin Schaeffer (el Stuttgart) 250 eŭrojn. Tio permesis subvencii la klubojn: Nova Generacio de Esperanto, Verdaj Geamikoj, Pacaj Metiistoj, Zamenhofa Klubo, Geamikoj de Dio. Oni elspezis krome por korespondado kaj fotokopioj, por la vojaĝkostoj de la ĝenerala sekretario, por la telefonkostoj, kaj donis 5000 F.CFA por ebligi al novaj esperantistoj partopreni la jarfinan okcidentafrikan kongreson en Togolando.

BEF devis rezigni pri propra poŝtkesto (B.P.373) pro la alta luo (45,80 eŭroj). Tial ĝi nun uzas la privatan poŝtkeston de la ĝenerala sekretario, François Hounsounou: B.P.226, Lokossa (Mono). La federacio proponas dek kandidatojn por UEA-membreco per Fondaĵo Canuto.

François Hounsounou

Ĉu granda E-Centro en Goma?

Jam dek monatojn oni lernas en Goma Esperanton kaj dankas sian Dion, kiu sendis la afablan homon, samideanon Hubert Ntawu, kiu malkovris al la lernantoj nian pacan, unuigan lingvon.

En majo 2003 estis kreita Goma Esperanto-Klubo (GEK) kun la deziro kontribui, ke Esperanto fariĝu la dua lingvo de ĉiu homo. Registristoj multaj gejunuloj kun la deziro lerni la lingvon. Hans Bakker sendis al la klubo kompletojn de la kurso Fere kaj lernolibrojn. Alphonse Waseka kaj fraŭlino Gertrude

Bembeleza iris al Kalonge kaj Kavuma por disvastigi Esperanton laŭ la peto de Daniel Durand de Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato. En oktobro 2003 la klubo per siaj propraj rimedoj malfermis sian unuan publikan klason por komencantoj. Por ke GEK fariĝu granda centro por disvastigi Esperanton en tiu ĉi parto de Afriko, ĝi bezonas havi oficialan rekonon ĉe la lokaj instancoj, lernolibrojn por komencantoj, vortarojn (franca-E/E-franca), kaj lernolibrojn. La klubo esperas, ke UEA kaj la Afrika Oficejo disponigos al ĝi financajn rimedojn, kiuj ebligas lui ejon, pagi pro administraj aferoj, aĉeti kretojn, kajerojn ktp. Bonvenaj estas donacoj, malgrandaj financaj rimedoj, plej bone sendi per Western Union. (Bv. rete informi pri tio). Poŝta adreso: Goma Esperanto Klubo, B.P. 78 Gisenyi/Rwanda.

Alexis Assumani Bengantundu

Sur la filmo: Supre: 1. Alexis Assumani Bengantundu. 2. La konstruata E-lernejo en Togolando. 3. Zamenhoffesto en Aguidahué, Benino. 4. E-grupo en Goma. **Sube maldekstre (p. 52):** 1. La kongresintoj en Soweto, en botanika ĝardeno. 2. La TIEto-gvidantaro. 3. La grupo en Kalogne. **Sube dekstre:** 1. La premiita Clement Mokone dum Festo en Francio. 2. Seminarianoj en Benino (maldekstre la gvidanto François Hounsounou). 3. Zamenhoffesto en Aguidahoue, Benino.



La klubo Verda Maro en Badagary, Niĝerio



Braza Centro seminariis

De la 28-a de januaro ĝis la 1-a de februaro 2004 okazis seminario en Braza-urbo (Kongo-Brazzaville, Kongolanda Respubliko) pri la graveco de Esperanto. Ĝiaj temoj: *Historio de Esperanto, La vivo de Zamenhof, Tri elementaj lecionoj.*

Alvenis 27 partoprenantoj, kiuj vigle interesiĝis pri la disvastigado de Esperanto en la lando. Multaj el ili deziras daŭrigi la kurson kaj esperas akiri la bezonatajn lernilojn.

Dialondama Michel

Kalimba en Kongolando

La Esperanto-klubo Kalimba en la urbo Uvira, orienta Kongolando, estis fondita en la jaro 2000 de s-ro Namutema Wabasobe Athanase. La 15 klubanoj studas Esperanton ĉiun vendredon kaj dimanĉon. Inter ili estas instruistoj de elementa kaj mezgrada lernejoj.

Rondvojaĝo tra Togolando

La francaj gesamideanoj Evelyne, Françoise kaj Jean Pierre faris komence de tiu ĉi jaro unumonatan rondvojaĝon tra Togolando.

Dum la rondvojaĝo ili propagandis la internacian lingvon kaj varbis novajn adeptojn, donacante kurslibrojn kaj semante verdajn grenojn sur siaj itineroj.

En la vilaĝo Kuve, kie ilia amikino fondis bibliotekon, ili aranĝis 4-tagan E-kurseton por ses entuziasmuloj. Al la E-grupo en Lomé ili donacis tridekon da vortaroj, kurslibroj kaj romanoj, kaj al la Afrika Oficejo de UEA dek kompaktdiskojn. Menciindas ankaŭ vizito al la E-lernejo konstruata en Togolando de la Instituto TIETo. Al la kaso de tiu lernejo la malavaraĝa gesamideanoj donacis monsumon por financi plantadon de arboj, kies ombroj estos utilaj por la lernantoj.

Ĉiuj kiujn la francaj gastoj renkontis, ĝojis pri la rara vizito kaj nenie mankis gastamo tiel karakteriza por togolandanoj. La vizito de francaj geamikoj agrable vigligis la Esperanto-vivon en Togolando.

Adje Adjévi

ĝen. sekretario de la togolanda E-movado
B.P. 6062, Lomé -Togo
rete: adjeviah@yahoo.fr



Evelyne, Françoise kaj Jean Pierre kun la togolanda gastiganto Adje Adjévi

La kurson gvidas s-ro Namutema. Tiucele li ĉiufoje biciklas el sia vilaĝo Kiliba, je distanco de 17 km de la urbo Uvira. En la biblioteko de la klubo mankas E-libroj kaj vortaroj. Ĝi bezonas ekzemple *Plenan Vortaron* kaj *Dictionnaire Pratique*.

La klubo ne havas propran klubojon, sed pruntas ĉambron kiu ne havas nigran tabulon. Pro la militado oni vivas en ekstrema mizero. Mankas nutraĵoj kaj vestaĵoj, sed Esperanton oni ne forlasos.

Michael Muyirike

UTE en Togolando

La ĉefaj kampoj en nia agado generale estas informado, instruado kaj utiligado. La E-movado en Togolando tiom strukturiĝas, ke ĉiu kampo havas propran zorgantaron. Pri informado okupiĝas la TEJO-sekcio en Togolando, ĵunulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj (JOE). La instruadon prizorgas TIETI-Instituto en Togolando (TIETo), la ILEI-sekcio en Togolando. La tria kampo estas tiom vasta, ke prizorgas ĝin la estraro de UTE kaj la organizaĵo Unu Homaro, Unu Planedo (HP). Ĝia tasko estas helpi al UTE kaj al ties sekcioj realigi mondonajn aferojn cele al memstarigo.

Ne estas silento ankaŭ sur la religia tereno; la Unuiĝo de Togolandaj Esperantistoj-Katolikoj (UTEK) disvastigas la lingvon inter katolikoj kaj la katolikismon inter esperantistoj. Decas menci ankaŭ la grupon, kiu zorgas en Togolando pri la doktrino de Bruno Gröning kaj ne malaperis spuroj pri la Tempa Trako de la germanino Margarete Bettmann.

Al la plej aktivaj fakoj apartenas TIETo, la instrufako de la landa asocio UTE, TIETI-Instituto de Esperanto en Togolando, kies celo estas informi kaj eduki pri la movado esperantista kaj per Esperanto pri temoj eksterlingvaj, ekzemple vivokonceptoj, vegetarismo, intersteno, parapsikologio, joko, sanzorgo, ktp; organizi Esperanto-kursojn kaj ekzamenojn.

Gia periodaĵo *OVo* (*Ondo da Vero*) estas libera tribuno por esperantistoj. Per siaj kvar numeroj retaj kaj du paperaj jare *OVo* informas, instruas, legigas, ridigas kaj paroligas ankaŭ bestojn kaj plantojn per siaj fabloj, fabeloj, ktp.

Necesas viziti Togolandajn klasĉambrojn por malkovri la mankon de lernejoj. En unu ĉambro kutime estas pli ol cent junuloj, kaj multaj devas iri plurajn kilometrojn antaŭ ol atingi lernejojn, konstruitajn plejparte el paŭlo-plektaĵoj. Dum nepluva momento tiom sunas, ke en la klasoj estas varme (pli ol 35 gradoj), kaj dum pluvsezono la klasoj transformiĝas en riveretojn. Lernejojn bezonas la kompatindaj infanoj, kiuj ne mem elektis veni en tiun ĉi mondon. Ili estas helpendaj.

TIETo ŝatus helpi kaj klopodas havi propran lernejon, kiu funkcii laŭ la leĝoj kaj instruprogramoj en Togolando. Krome estu instruata ankaŭ Esperanto, unue kiel vivokoncepto, kaj poste kiel lingvo.

TIETo alvokas ĉiujn kunkonstrui tiun lernejon. La legantoj sciu, ke eĉ unu moneron, kiu eble nun ŝimas sub lito aŭ en glaseto, oni prefere sendu al TIETo, ĉar en glaseto kaj sub la lito la monero valoras nenion, dum ĉe TIETo ĝi preparas infanojn kaj junulojn al ilia estonta vivo. Savante infanojn kaj gejunulojn de analfabeteco ni kontribuas al starigo de nova mondo-ordo! Ni faru tion.

Per granda sinofero de Hans Bakker, mono estas kolektita kaj la lernejo estas nun konstruata. Ĝian progreson vi povas vidi vizitante la retpaĝon: <http://www.esperanto-nederland.nl/togo/bouw.htm>. En septembro 2004 la lernejo malfermos siajn pordojn al la infanoj. Pli da helpoj estas bezonataj por finkonstrui la lernejon kaj funkciigi ĝin.

Pliaj informoj estas riceveblaj ĉe: TIETo, B.P. 13 169, Lomé, Togo, retpoŝto: esp.togo@cafe.tg, aŭ ĉe: Stichting "Een school in Togo", Hans Bakker, Kastelenstraat 231, NL 1082 EG Amsterdam, Nederlando, rete: eenschoolintogo@raketnet.nl

Bona espero en Suda Afriko

Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA) grupigas Esperantistojn de la landoj de Suda Afriko, precipe Sudaafriko kaj Zimbabvo. Bedaŭrinde, tre malfacilas la situacio en Zimbabvo kaj multaj el niaj samideanoj tie estas sub ĉiutaga minaco. Pruvo estis okazaĵoj de la pasinta novembro, kiam oni malliberigis tri junajn samideanojn en Harare, rifuĝintojn de aliaj afrikaj landoj. Bonŝance UEA akceptis helpi al ilia liberigo. Feliĉe en Sudaafriko la situacio estas pli bona. Tio allogas eksterlandajn vizitantojn kaj ebligis niajn aktivajn: en 2003 ni presigis novajn kolorajn informilojn, kunlabore kun ILEI, ni varbis dum la jara konferenco de internacia federacio de lingvoinstruistoj, kie okazis du prelegoj pri Esperanto kaj ekspozicio pri indiĝenaj Dialogoj kun diskutotablo. Ni ekigis kunlaboron kun grupoj kiuj apogas multlingvecon en Sudaafriko (MAG) kaj dissendis novaĵleteron al interesitoj en la angla, por ke ili vidu la utilecon de Esperanto. Ni aperigis duonpaĝan artikolon en Soweta gazeto *Jozi News* kaj komencis kompletigi nian informadon per interreto (www.esperanto.za.org). En Soweto ni starigis novajn kursojn kaj daŭrigas korespondan kurson. Fine de 2003 ni okazigis ekzamenon laŭ la reguloj de UEA.

Ni aperigas la revuon *Bona Espero*, kies lasta numero enhavis historion de nia movado, verkitan de eminenta sudaafrika esperantisto Edwin de Kock. En majo 2003 ni okazigis mini-kongreson en Soweto kaj ni planas pli grandan tutafrican kongreson por marto 2004. Ni tamen sukcesis sendi unu el niaj junaj lernintoj, Clement Mokone, al ĵunulara renkontiĝo Festo en Francio. Post sukceso en elementa ekzameno, Clement estis lotumita kiel gajninto de nia konkurso kaj la asocio donacis al li la flugon kaj la kostojn.

Magali von Blottnitz, sekretario, Esperanto-Asocio de Suda Afriko 6, Dulwich Green Boundary Road Newlands 7700 South Africa, Tel.: +27 21 685 3979, e-poŝto: hvb@mweb.co.za

Jubilea festo en Kinŝaso

La 14-an de decembro 2003 okazis en Kinŝaso jubilea festo de la landa asocio de Kongolanda Demokrata Respubliko, kiu aktivis jam 40 jarojn.

Sesdeko da partoprenantoj aŭdis prelegojn pri la historio de DKEA kaj pri Zamenhof, diskutis, spektis ekspozicion pri libroj kaj vidis filmon pri ĵumeiĥo-terapio. Fine, en tre agrabla etoso okazis koktelo, kun Esperanto-kantoj de s-roj Junior Nangu kaj Barba Mafuila, kiuj kantis kun gitara akompano. Dum la koktelo oni legis mesaĝojn ricevitaĵojn okaze de la jubileo de Renato Corsetti, Hans Bakker kaj Molière Nangu. Multaj partoprenantoj aliĝis al nova E-kurso.

(Barba Mafuila Mavomo)

Juna bando en Niĝerlando

La 12-an de decembro 2003 tri junaj esperantistoj de la Ĉefurbo de Niĝerlando Niamey – Florent Cluse, Arthur Semedo kaj Mathieu Sediro – kunvenis por diskuti pri Esperanto kaj ties disvastigo en la lando. Dum la kunveno, kiun gvidis Florent Cluse, oni konstatis, ke Esperanto estas ĝis nun preskaŭ nekonata al multaj niĝerlandanoj. En Niĝerlando ekzistas multe da kulturaj mirindaĵoj kaj Esperanton oni povas ekspluati por teatro, kantoj, kongresoj, kunsidoj ktp.

La junuloj komencis la agadon per ekspozicio en la Franca Kulturcentro, per reklamo en lernejoj kaj per intervjuoj en radio. Tio vekis viglan intereson kaj nun ĉiudimanĉe kunvenas 12 geklubanoj, kiuj lernas per la Zagreba Metodo kaj la libro de Gbeglo Koffi Prenu plu. La klubanoj deziras

Seti Dismas

1995-2003



La plej juna esperantisto en Afriko estis verŝajne Seti Dismas, okjara filo de Robert Dismas, Bunda, Tanzanio. Li lernis Esperanton de la patro kaj korespondis kun svedaj esperantistoj. La 5-an de oktobro 2003 malaria atako mortigis lin en 18 horoj. Li estis la espero de sia familio kaj de siaj geamikoj en Svedio, sed ne rajtis plu vivi pro malsano, kuracebla se la riĉa mondo volus tion.

Hans Bakker

Ni, la svedaj geamikoj de la familio Dismas en Bunda, Tanzanio, kun profunda malĝojo ricevis la sciigon pri la morto de nia amiketo Seti Dismas. Seti ĝojigis nin per leteretoj kaj desegnaĵoj kaj ni antaŭvidis longdaŭran kontakton kun tiu milda, diligenta, lernavida knabeto. Ni funebre kunigas kun la familio pro perdo de ilia plej aĝa filo.

Anna-Maria Lange

la amikino de Seti en Lund, Svedio

Seti Dismas naskiĝis la 22-an de novembro 1995 en Bugando, Tanzanio. En 2002 li komencis viziti la elementan lernejon en Mazoezi. Tie li estis unu jaron kaj en 2003 li registriĝis en la unua klaso de la elementa lernejo en Miembeni. Seti interesiĝis pri religiaj kantoj kaj multe kantis. Li ankaŭ satis desegni kaj pentri. Li lernis Esperanton kaj estis ano de Paca Esperanto-Klubo en Bunda. Lastatempe Seti interŝanĝis leteretojn kun Ebba, sveda knabino, kaj jam pli longe kun Anna-Maria Lange kaj Sture Andersson, ankaŭ en Svedio. Li estis silentema, humila, afabla knabo, bone edukita kaj kun bona konduto, ĉiam preta helpi la gepatrojn kaj prizorgi siajn gefratetojn. Li ripozu pace. La gepatroj, la parencaro, la geamikoj

rilati kun aliaj esperantistoj tra la mondo, korespondi, amikiĝi. Eventualajn donacojn (librojn, periodaĵojn, ktp) bonvolu sendi al: Cluse Florent, S/C Kossi Kodjo Medouhadj, B.P. 10951, Niamey, Niger.

Florent Cluse (florent.cluse@yahoo.fr)

Verda Maro en Niĝerio

La 23-an de aŭgusto 2001 fondiĝis en la urbo Badagry, dank' al klopodoj de Opa Moses kaj Ahmed Seraphin Anagovi, la klubo Verda Maro. En la komenco la dek tri membroj de la klubo kunvenadis en baza lernejo de la vilaĝo Agbovi. Pro la grandaj distancoj inter la loĝejoj de la klubanoj kaj la kunvenejo oni trovis alian kunvenejon en Ajara Vetho, kie nun okazas la kunvenoj merkrede kaj sabate. La klubanoj kune lernas kaj la progresantoj helpas al la komencantoj. Por materialoj la klubo multe dankas s-inon Helga Farukuoye, kiu delonge helpas niĝeriajn esperantistojn kaj sendas paketojn kun esperantaĵoj. La klubo ne havas fiksan membrokoton. Klubanoj laŭvole donas kion ili havas kaj serĉas subvenciojn por helpi al la klubanoj partopreni kongresojn, afiŝi tra la urbo Badagry kaj interesi homojn pri Esperanto. Ilia slogano estas *Ni verdigu nian Medion per Esperanto*.

Ahmed Seraphin Anagovi

Bona tradukmaŝino baziĝas sur tradukmemoro

En antaŭa artikolo mi pledis por daŭra tradukado (esperantigo), de aktualaj prestiĝaj revuoj (*The Economist*, *Der Spiegel*, ktp) kiel strategio survoje al ĝenerala rekono de la esprimpovo kaj pontlingva kapableco de E-o, eĉ en la dinamika mondo de EU kaj internacia politiko. Mi laŭdis Vilhelmon Lutermanon pro lia bonega ekzemplo kun *Le Monde Diplomatique*, sed mi ne tuŝis la demandon ĉu aŭtomata tradukado povus helpi ĉi-rilate.

Por klarigi, mi reirigardas al la DLT-esplorprojekto de la 80-aj jaroj. Ĝiaj plej konataj ecoj (vidu la revuon *Esperanto* 2/03, p. 32; DLT = *Distribuita Lingvo-Tradukado*) estas la principo uzi pontolingvon aŭ interlingvon, kaj la elekto de Esperanto por tiu celo. En multlingva mondo, tiu arango draste reduktas la nombron de tradukoj, sed atentu: restas la problemo aŭtomate traduki altkvalite inter nur du lingvoj. Homoj kiuj nuntempe uzas aŭtomatan tradukservon en la interreto, verŝajne konscias ke alta traduk kvalito ankoraŭ mankas. Tio validas por angla-franca, angla-rusa ktp same kiel por angla-Esperanta aŭ inverse. La fama reguleco de Esperanto ja ne estas absoluta, sed nur grada avantaĝo kompare al aliaj lingvoj. Do la DLT-teamo, malgraŭ nia okulfropa arkitekturo, devis sisteme venki la saman teknologian obstaklon kiel aliaj evoluigantoj de tradukmaŝinoj: Eurotra, Rosetta, IBM ktp. Neniu el ili (Eurotra malgraŭ budĝeto dekobla de DLT) sukcesis, sed estas interese indiki la manieron en kiu la teknologio post 1990 ŝanĝis direkton.

Du revoj

Konstrui nevenkeblan ŝakkomputilon estas defio, aŭ eĉ revo, iomete komparebla kun altkvalita tradukmaŝino. Sur tiuj du unuavide tute malsamaj esplorterenoj okazis komuna direktoŝanĝo. Ĝis antaŭ la fino de la 80-aj jaroj oni konstruis maŝinojn kiuj estis regul-bazitaj: oni supozis ke nutri komputilojn per ŝakreguloj aŭ gramatikreguloj sufiĉas. Tio klarigas la abundon de lingvistoj, pleje gramatikistoj, en la iama tradukmaŝin-evoluigo.

Ĉirkaŭ 1990, iom post iom la alpaŝo ŝanĝiĝis en la direkto de grandegaj datumbazoj, en kiuj amaso da historiaj datenoj (*kazoj*) anstataŭiĝas la regulojn, almenaŭ ilian ĉefrolon. Do oni nun komencis enmeti detalajn registraĵojn de ĉiuj majstraj ŝakludoj. Analoge, tradukmaŝin-konstruantoj turnis sin al la kono de tradukistoj, en la formo de *paralelaj korpusoj*: vastaj kolektoj de dulingvaj tekstoj – la traduko ĉiam flanke de la fontoteksto. Se la kvanto de tiuj tekstoj estas sufiĉe granda (dekoj da milionoj da vortoj), la ĝusta softvaro funkcigos ĝin kvazaŭ ampleksan tradukmemoron kun frazeologiaĵoj kaj ĉiaspecaj ĉirkaŭtekstoj de vortuzo. La enorme kreskinta memorkapacito de modernaj komputiloj kontribuis al tiu nova direkto. Sed pli esence estas, ke la ĉiutaga sperto el la laborpraktiko de homaj tradukistoj iĝas tiu sur kio la plua evoluigo de tradukkomputiloj baziĝos.

En la jaroj 1988-1990 la DLT-projekto iris en tiu nova esplordirekto de tradukmemoro per paralelaj korpusoj, el kiuj eĉ DLT ĉiam unu korpuso estas Esperanta. Victor Sadler publikigis faklibron (*Working with Analogical Semantics*, 1989) pri nia korpus-bazita semantika metodo, kaj mia plano por

la bedaŭrinde ne realigita sekva evoluigfazo (1990-1996) antaŭvidis konsiderindan plentempan dungon de Esperantaj tradukistoj, terminologoj ktp en starigita laborcentro en mez-eŭropa urbo.

Obstaklo

Ke ankaŭ la novaj tradukmemor-bazitaj sistemoj ne estas rapide konstrueblaj, montras la fakto ke ĝis nun ankoraŭ neniu firmao surmerkatis unu, almenaŭ ne ĉiufankan altkvalitan tradukmaŝinon por iu ajn teksto. La obstaklo ĉi tie ne estas teknologia, sed pli ĝuste ekonomia: por kolekti kaj prizorgi la necesajn grandajn tekstokorpusojn oni bezonas tutan stabon de kunlaborantoj, ne kelktempe sed konstante, ĉar lingvoj (terminaro, esprimaro) iomete ŝanĝiĝas ĉiujare. En kazo de DLT al tio aldoniĝis ke la provizo de jam ekzistantaj dulingvaj korpusoj (ekz. angla-Esperanta) estas multe malpli granda ol ĉe aliaj lingvoparoj (ekz. angla-franca). Do sukcesplena revivigo de DLT aŭ simila projekto en la estonto, por konstrui komputilan traduksistemon kun Esperanto kiel pontlingvo, forte dependos de la ekzisto de grandegaj kolektoj de tekstoj tradukitaj (el ekz. la angla aŭ franca) en Esperanton. Tradukita literaturo (beletro) ne sufiĉas. Se la celo estas konstrui tradukkomputilon por ĉiutaga uzo en ekz. la EU-Komisiono, tiam oni devas unue nutri la tradukmemoron per aktualaj tekstoj proksimaj al la agadterenoj de tia organizo.

Simbiozo

Tiumaniere, multajn jarojn permane traduki finfine kondukos al konstruado de preskaŭ perfekta traduk-aŭtomato. Se tiu perspektivo ne sufiĉe kontentigas vin, jen alia flanko de la afero: duonvoje, intertempe pretigota duonaŭtomato helpas la homajn tradukistojn fari la laboron pli facila. Ne forgesu ke hodiaŭ la plimulto de komercaj kaj publikservaj tradukburooj jam uzas tradukhelpilan softvaron, kiel enkomputiligitajn vortarojn kaj terminarojn, sed ofte ankaŭ kun ia formo de komuna tradukmemoro, tiel ke junaj tradukistoj utiligas la sperton de siaj superaj kolegoj, kaj komuna stilo aŭ termin-uzo rezultos ene de la sama tradukprojekto. Ankaŭ en Esperantito trezoro de digitaj tradukhelpiloj estas uzebla. Mi mencias nur la ampleksan germana-Esperantan vortaron de Thomas Schütz kun 41 000 Esperantaj enirvortoj, inkl. kunmetojn (vidu retejon www.thschoetz.de/computer/vortaro).

La longe atendita tradukkomputilo baziĝos sur tradukista lerteco – kaj inverse. Tiela simbiozo inter homa tradukisto kaj tradukmaŝino estas realisma antaŭvido por la nuna kaj sekva jardekoj.

Toon Witkam



Toon Witkam

Kalendaro

Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la julia numero.

marto

10-20: Sudamerika rondvojaĝo en Bolivio-Peruo-Ĉilio. ☎ Esperantotur, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. ☎ +48-52-3461151, ☎ turismo@bydg.pd.net

19-23: Subkontinenta Kongreso en Roopeplaat apud Pretoria, Sudafriko. ☎ Axel von Blottnitz, ☎ vonblottnitz@icon.co.za

20-28: Vojaĝo al 6-a TAKE (Tutamerika Kongreso de Esperanto) en Havano-Kubo. ☎ Esperantotur (v. 10 mar).

20 mar - 03 apr: Sudamerika rondvojaĝo en Lima - Nasca - Arequipa - Kanjono Colca - Arica - Calama - dezerto Salar de Atacama - gejseroj Tatio kaj tra Calama - Antofagusta - Santiago de Chile. ☎ Esperantotur (v. 10 mar).

21-27: 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo. ☎ Kuba Esperanto-Asocio, poŝtflako 5120, CU-10500 Havano, Kubo. ☎ +53 (7)404484 kaj 53-9102, ☎ 33-8729, ☎ kubesp@ip.etecsa.cu; kubesp@enet.cu; diaznorberto@latinmail.com

26 mar - 03 apr: Nacia Kongreso de Franca Fervojista E-Asocio. ☎ Denise Rolland, Le Beudrec, FR-56950 Crach, Francio, ☎ jd.rolland@wanadoo.fr

27-28: Kultura Semajnfino en La Chaux-de-Fonds. ☎ Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. ☎ +41-32-9267407, ☎ kce.esperanto@bluewin.ch

aprilo

01-06: Marturisma Internacia Renkontiĝo. MIRO, en Pula, Kroatio. ☎ Kroatia Esperanto-Junulara Asocio, Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb, Kroatio, ☎ keja_kroatia@yahoo.com, <http://www.miro.tkl>

05-12: 20-a PSI - Printempa Semajno Internacia, la paska renkontiĝo por la tuta familio, en Duderstadt, Germanio. ☎ Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio, ☎ psi@esperanto.de; <http://www.esperanto.de/psi>

06-10: Akirado kaj lernado de du lingvoj kun Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti en Bouresse. ☎ Kvintepalo, Esperanto-Centro, Rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. ☎ +33-(0)549428074, ☎ kvintepalo@club-internet.fr, <http://home.town.aol.com/yannickdum/kvintepalo.html?l=fr>



07-13: 28-a Internacia Junulara Festivalo, IJF en Abetone, Toskanio, Italio. Temo: *Muziko kunigas homojn*. ☎ Francesco Maurelli, via G. Spon-tini 29, IT-00043 Ciampino (RM), Italio, ☎ ijf.admin@esperanto.it, <http://iej.esperanto.it/ijf/2004/>

08-12: Plurnivela Internacia Kursaro por komencantoj kaj progresantoj; E-metodiko en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ Kultura Centro Esperantista (v. 27 mar).

08-15: La 56-a IFEF-Kongreso en Sopron, Hungario, organizata de aŭstraj kaj hungaraj fervojistoj. ☎ 56-a kongreso de IFEF, Alfonz Moró, Olga u. 3, HU-7632 Pécs, Hungario, ☎ ikf@freemail.hu

10-12: 59-a SAT-Amikara Kongreso en La Roche-sur-Yon (departemento Vendée). ☎ Laborista Esperanto-Asocio, 67 Avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio.



10-17: Infana renkontiĝo en Grezjono. ☎ Kastelo Grezjono, FR-49150 Baugé, Francio. ☎ +33 02 41 89 10 34, ☎ grezjono.kastelo@free.fr, <http://grezjono.kastelo.free.fr>

20-24: Shakespearo kaj Ŝekspirajoj de internacia teamo kun praktikado de la lingvo kaj iniciado al ĵogo en Bouresse. ☎ Kvintepalo (v. 6 apr).

23-25: Junulara Esperanto-Renkoto, JER en Hungario (Katicatanya apud Kaposvár). ☎ Hungara E-Junularo, Vera Acsádi, ☎ hej@eszperanto.hu, <http://www.esperanto.hu/hej/>

24: Dua festa renkonto en Les Brenets okaze de 100-jara jubileo de SES, kun ties jubilea Ĝenerala Asembleo en Les Brenets apud Le Locle, kun sekva semajnfina migrado sur la monto Tête de Ran. ☎ Claude Gacond, Chevreuils 14, 2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

24 apr-02 maj: 29-aj E-Taĝoj de Bydgoszcz kun 25-a AKB-Sesio

kaj kurso de internaciaj Esperanto-vojaĝgvidantoj. ☎ Esperantotur (v. 10 mar).

27 apr-01 maj: Zamenhof kaj medicino en Bouresse. ☎ Kvintepalo (v. 6 apr).

29 apr-02 maj: Seminario pri pilargiĝo de EU en Nova Gorica, Slovenio. ☎ Anka Vožlič, ☎ +386-1-7504383, ☎ anka.v@siol.net

30 apr - 02 maj: La tuta Biblio en Esperanto, en Bad Wimpfen, Sud-Germanio. ☎ Bernhard Eichkorn, ☎ Bernhard.Eichkorn@esperanto.de

30 apr-03 maj: 86-a Brita Kongreso de Esperanto en Felixstowe, Britio. ☎ EAB, Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST13 9DG, Britio. ☎ 0845-230-1887, +44-1782-372141, ☎ eab@esperanto-gb.org

majo

01-09: Aroma Jalto 2004: lingva E-festivalo. ☎ Volodimir Viktoroviĉ Hordijenko, pk. 35, UA-01133 Kijiv-133, Ukrainio. ☎ (044) 2951701, ☎ volodimir_h@ukr.net; <http://www.aromajalto.by.ru> www.aromajalto.by.ru

07-09: Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco, San Francisco, Kalifornio, Usono. ☎ SFERO, ☎ WRHarmon@aol.com, <http://www.esperanto.org/us/SFERO/TKEK2004/>

07-09: 5-a Trilanda Renkontiĝo de Germana Esperanto-Junularo en Heppenheim, Germanio. ☎ Inge Simon, ☎ Simon-Esperanto@t-online.de, <http://ulrich.matthias.bei.t-online.de/trilanda.htm>

08-15: 56-a IFEF-kongreso en Sopron. ☎ Alfonz Moró, Olga u. 3, HU-7632 Pécs, Hungario, ☎ ikf56@freemail.hu, <http://www.eventoj.hu/ife/56/>

09: Eŭropa Bunto: Eŭropaskala Manifestacio en Strasburgo por multlingveco. ☎ Eŭropa Bunto, 6 rue J-P Callocé, F-22000 St-Brieuc, France ☎ +33 02 96 68 55 21, ☎ europa.bunto@eraro.com, <http://europa.bunto.free.fr/>

15-18: IFEF-Postkongreso en Székesfehérvár Hungario. ☎ Magyar Vasutás Egyesület, Andrassy út 73-75, HU-1062 Budapest, Hungario, ☎ ikf56@freemail.hu

15 maj - 07 jun: Vojaĝo al 13 landoj de Malgrandaj Antiloj. ☎ Esperantotur (v. 10 mar).

16-18: Semajnfina jarkunveno de SATEB (SAT en Britio) en Barlaston. ☎ AEB (v. 30 apr). ☎ arturo@signalprent.demon.co.uk

18-21: 12-a Ĉina Xinyang Teo-Festivalo (Esperanto kiel pontlingvo). ☎ Zhang Xuesong, Changtaiguan Gongdiansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio. ☎ +86-376-8821553, ☎ teofestivalo@peoplemail.com.cn, <http://tefello.html.533.net/teofestivalo.htm>

18-22: 21-a Anhui-a Biera Festivalo kun E-o kiel laborlingvo en Hefei urbo. ☎ Liu Jianguo direktoro, Hefei Verdstelo Esplora Instituto pri Turismo, Langyashan Lu, Changhuai Xincun, B-

Qu 3-105#, CN-230011, Hefei, Ĉinio. ☎ +86-551-4484370, ✉ +86-551-4210414, ✉ yjs00815@mail.hf.ah.cn

21-22: Esperanto por komencantoj. Intensaj semajnfinaj Esperanto-kursoj ĉe VHS Düsseldorf, Germanio. ☒ Harald Schmitz, ✉ hschmitzpu@gm.x.de

22-23: Kultura Semajnfino pri Ruslando kun Anatolo Gončarov en La Chaux-de-Fonds. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 27 mar).

23-26: Komuna Skotlanda-Brita E-Kongreso en Glasgovo. ☒ Esperanto-House (v. 16 maj).

27-31: Tagoj de Kijivo, Ukrainio. ☒ Mikaelo Lineckij, p.k. 91, Kiev-201, UA-04201, Ukrainio. Tel: +380-44-4320743, ✉ rejo@ukr.net aŭ Mikaelo Lineckij, lineckij@ukrpost.net, <http://www.espero.kiev.ua/>

27-31: 9-a “Radiocamp am Bodensee”. ☒ La liberaj radioj el Baden-Württemberg, Germanio. ☒ Konrad Gramelspacher, ✉ haus25@gmx.net, <http://www.grunern.de/radiokampo2004/>

28-29: Esperanto por progresintoj. Intensaj semajnfinaj E-kursoj ĉe VHS Düsseldorf, Germanio. ☒ Harald Schmitz, (v. 21 maj).

28-30: SKEF-Kongreso en Brezová pod Bradlom, Slovakio. ☒ Mária Tomašovičová, ☎ +421 903 528 175, ✉ valapka@stonline.sk

28-31: 81-a Germana Esperanto-Kongreso en Neubrandenburg (Meklenburgo-Antaŭpomerio). ☒ Germana Esperanto-Asocio, Immentahlstr. 3, DE-79104 Freiburg, Germanio. ☎ +49-761-289299, ☒ Germana Esperanto-Asocio, gea@esperanto.de, <http://www.esperanto.de/gek/>

29-30: Valencia-Murcia E-kongreso en Chesto apud Valencia, Hispanio. ☒ <http://www.infonegocio.com/augustocasquero/cheste.htm>

31 maj - 04 jun: Ripozo ĉe la Balta Maro (proksime al Stralsund). ☒ Gunter Ebert, Sanddormweg 62, DE-18439 Stralsund, Germanio. ☎ +49-3831-490003, ✉ gum.eb@t-online.de

junio

11-18: Busvojaĝo al 14-a Eŭropa E-Forumo en Benelukso. ☒ Esperantotur (v. 10 mar).

12-13: 52-a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, Japanio, ☒ kleg@mvt.biglobe.ne.jp

20-31: Ora Somero 2 – Instru-ripoz-familia renkontiĝo apud Poltavo, Ukrainio, gvidata de Vladimir Soroka. ☒ www.espero.kiev.ua

21 jun - 16 jul: Busvojaĝo al Nordkapp kaj 40-a BET (Baltaj E-Tagoj) en Litovio. ☒ Esperantotur (v. 10 mar).

22-27: Folkloro renkontiĝo en bieno Šlokenbeka. ☒ Mara Timermane, Kr. Valdemara 145/1-32, LV-1013 Riga, Latvio. ☎ +371-911 5413, ✉ mtimermane@yahoo.com

30 jun - 04 jul: Frusomera Renkontiĝo Esperanta, ŝokanta Obstinulojn (E-kviza okazaĵo kun premioj). ☒ Marian Zdanowski, ul. Limanowskiego 4, PL-10-343-Olsztyn, Pollando, ✉ avolamer@ols.vectranet.pl aŭ angiel@polbox.com, <http://www.ols.vectranet.pl/~avolamer/esperanto/>

julio

02-08: REJO-3 – Renkontiĝo de E-Junularo en

Kievo, Ukrainio. Temo: *Esperanto – kulturperanto*. ☒ Mikaelo Lineckij, ab.k.140, 04201 Kijiv, Ukrainio. ☎ (044) 432 07 43, ✉ lineckij@ukrpost.net; rejo@uafree.net; http://www.espero.kiev.ua/events_rejo-3_es.html

03: Memorfesto de Seula Esperanto-Kulturcentro, Koreio. ☒ kaj gratulmesaĝoj: ✉ esperant@unitel.co.kr, <http://www.esperanto.co.kr/>

3-10: la 57-a kongreso de IKUE (katolikoj) en Litovia apudmara urbo Kretinga.

03-16: Busvojaĝo al 57-a IKUE-Kongreso en Kretinga (Litovio) kaj 40-a BET (Baltaj Esperanto-Tagoj) en Litovio. ☒ Esperantotur (v. 10 mar).

03 jul-21 aŭg: Somerstagoj en Grezijono (v. 10 apr).

05-10: Naturamika Semajno en Grindelvaldo (Berna Kantono) kun Francisko Degoul. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 27 mar).

05-23: NASK 2004 ĉe la interkultura alternejo The School for International Training (La Alternejo por Internacia Trejnado) en nordorienta regiono de Usono. Haveblas stipendioj. ☒ Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 Usono 360-754-4563, ✉ eddyellen@aol.com; <http://www.sit.edu/esperanto/index.html>

06-09: Antaŭkongreso de IJK en Peterburg/Leningrad. ☒ LKK de IJK, Slavik Ivanov, <http://www.tejo.org/ijk/ak-spb.php>

07-11: Vivo kaj historio de pupoj kaj vestokudrado kun Evelyne Boilau kaj Hartmut Fielmann en Boursesse. ☒ Kvinpetalo (v. 06 apr).

10: Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario, ✉ bajaj@eposta.hu, <http://www.bereczki-baja.sulinet.hu/esper/fishsup/>

10-17: 60-a IJK, Internacia Junulara Kongreso en ripozejo Berjocka apud Kovrov (regiono Vladimir), Rusio. ☒ LKK de IJK, Slavik Ivanov, ✉ slavik@babil.komputilo.org, http://www.tejo.org/wiki/ijk_2004; <http://www.tejo.org/rejm/ijk/index.php>

10-18: 40-aj jubileaj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-40) en urbeto Birŝtona, 40 km de Kauno. ☒ Litova Esperanto-Asocio: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. ☎ 370-37-228616, ✉ litova.ea@mail.lt

13-18: Plurnivela Internacia Kursaro, unua semajno en La Chaux-de-Fonds. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 27 mar).

16-20: Verda Kantofesto en Tukums. ☒ Mara Timermane (v. 22 jun).

17-21: 1-a Kongreso de Internacia Esperanto-Turismo en Malbork, Pollando, ☒ augustocasquero@infonegocio.com; http://www.malbork.pl/en/index_en.php?k=3&p=1.

17-23: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK – Esperanta gazetaro, Pécs, Hungario. ☒ Orbis Pictus de Viŝnja Branković, Via Parini 5, IT-34 129 Trieste, Italio. ☎/✉ +39-040-767875, ✉ orbispictus@iol.it, <http://www.osiek.org>.

18-22: 39-a Brazilia Kongreso de Esperanto kaj 24-a Brazilia E-ista Junulara Kongreso en Maceio. Temo: *Esperanto en Lernejo*. ☒ AAE, C.P. 396, BR-57020-970 Maceió/AL. ☎ (02182) 324-



2979, ✉ arikuubxci@ig.com.br, www.esperanto.org.br

18-24: SEZAM-3 apud Volgograd, Rusio. ☒ Eduard Kolosov, ✉ edya@gandex.ru, http://www.stelaro.by.ru/sezam/index_esp.html

19-21: Postkongreso de IJK en Ĉeboksari. ☒ LKK de IJK, Slavik Ivanov, <http://www.tejo.org/rejm/ijk/index.php>

20-24: Esperantaj gramatikaj kiujn Zamenhof ne solvis, kun tasketoj por la kursanoj en Boursesse, kun Wim Jansen. ☒ Kvinpetalo (v. 06 apr).

20-25: Plurnivela Internacia Kursaro, dua semajno en La Chaux-de-Fonds. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 27 mar).

23-29: Internacia Junulara Semajno (IJS) en Hungario. ☒ Hungara E-Junularo, p.k. 87, HU-1675 Budapest, Hungario, ✉ hej@esperanto.hu; <http://www.esperanto.hu/hej/index.php?lang=esperanto&encoding=utf8§ion=arangoj>

23 jul - 01 aŭg: Flugvojaĝo al 89-a Universala Kongreso en Pekino, Ĉinio kaj al 14-a Internacia Esperanto-Kongreso, kun vizitoj al Granda Muro kaj Tianjin; diversaj varioj. ☒ Esperantotur (v. 10 mar).



24-31: 88-a UK en Pekino, Ĉinio. Kongresa temo: *Lingva egaleco en internaciaj rilatoj*. ☒ UEA (la kolofono), http://www.uea.org/esperanto/index_kongres.html; <http://www.espero.com.cn/uk2004/e02-2.htm>

29 jul - 08 aŭg: 13-a MELA (Memzorga Lagumado) en Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbani. ☒ (poŝtelefonoj) Laca +36-30-2097864, Andi: +36-30-2097864, ✉ mela-krokodilo@gmx.net, <http://www.krokodilo.de/mela/mela.html>

31 jul - 07 aŭg: Kristana Kongreso (54-a kongreso de KELI) en ripozejo Sola Gratia, Bystřice pod Hostýnem, Ĉeĥio. Pavel Polnický, Lesní 150/VI., CZ-290 01 Poděbrady. ☎/✉ +420 325 615 651, ✉ cea.polnicky@quick.cz

31 jul - 08 aŭg: 26-a REF (Renkonto de Esperantistaj Familioj) en Mali Idoŝ, Vojvodino, Serbio. ☒ fam. CSö, II. Rakóczy Ferenc str. 32, YU-24321 Mali Idoŝ, Serbio kaj Montenegro, ✉ csoko@eunet.yu

31 jul - 15 aŭg: Malkovra Agado de Tibeto – karavanado al mistera firsto en Tibeto organizata de ĉinaj esperantistoj post la 89-a UK en Pekino kun E-o kiel laborlingvo. ☒ Liu Jianguo, Hefei Verdŝto Eŝplora Instituto pri Turismo, Langyashan Lu, Changhuai Xincun, B-Qu 3-105#, CN-230011, Hefei, Ĉinio. ☎ +86-551-4484370, ✉ +86-551-4210414, ✉ yjs00815@mail.hf.ah.cn

aŭgusto

01-07: Internacia Semajno "Eniro al Tibeto" post 89-a UK kun 5 itineroj kaj 11-gradaj prezoj. ☒ Xi'an Zhiyuan Kultura Firmao, Zuo Jun, JinhuaBei Lu Zhao nanlou 3-302, CN-710032 Xi'an, Ĉinio. ☎/✉ +86-29-83239619, ✉ tibeto2003@yahoo.com.cn aŭ partnero@pub.xaonline.com

02-06: Naturamika kaj Romanĉa Semajno en Engadino. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 27 mar).

06-11: Pri muziko kaj kantoj kun praktikado de Esperanto (Anne-Sophie Markov kaj Guillaume Ternant) en Boursesse. ☒ Kvinpetalo (v. 6 apr).

06-31: Busvojaĝo al Afriko kaj al 6-a Eŭropunia Esperanto-Kongreso en Bilbao, ☒ Esperantotur (v. 10 mar).

07-08: La 36-a Korea Kongreso de Esperanto en la Universitato Wonkwang (urbo Iksan, Jonbook). Temo: *Esperanto kaj religio*. ☒ Park Zoung-sook, ✉ sunitaamo@hanmail.net; esperant@unitel.co.kr; <http://www.esperanto.co.kr>

07-13: 44-a Esperanto-Somerlernejo en la sidejo de EAB kaj ties biblioteko en Stoke-on-Trent, Britio. Gastpreleganto: Onel Onet. ☒ AEB (v. 30 apr), ✉ wedgwood.college@staffordshire.gov.uk

07-14: Kultura Esperanto-Semajno kaj simpozio pri la esenco kaj estonteco de Esperanto en Caudefono. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 27 mar).

07-14: 70-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Studenta urbo en Nova Beograd, Serbio kaj Montenegro. ☒ Nedeljka Ložajić, Husinskih rudara 37/1, 11060 Beograd, Srbija i Crna Gora, ✉ nedeljka@ptt.yu

09-15: 43-a Esperanto-Somerlernejo en Barlaston. ☒ Esperanto-House (v. 16 maj).

14-21: 8-aj Internaciaj Renkontiĝoj de Plouézec. ☒ Jean-Pierre Ducloyer, 8, Rue de Montauban, FR-35750 Iffindic, Francio. ☎/✉ +33-(0)2 99 90 71 92, ✉ jeanpierre-ducloyer@club-internet.fr; <http://www.plouezec.fr/esperanto.html>

14-21: 77-a SAT-Kongreso en Bratislava, Slovakio. ☒ KAVA-PECH, Petro Chrdle, CZ-25229 Anglická 878, Dobřichovice, Ĉeĥio, ✉ Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz, <http://www.kava-pech.cz/us/at.htm>

14-21: Seminario por la trejnado de kulturaj manaĝeroj (kunlabore kun TEJO) parte en Caudefono. ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 27 mar).

16-27: 38-a Internacia Esperanto-Feriado kun lingvaj kursoj en Kudowa Zdroj, Pollando. ☒ Silezia Esperanto-Asocio, str. Dubois 3/1, PL-50-208 Wrocław, Pollando, ✉ vrocloaw@poczta.onet.pl, <http://wrocloaw.republika.pl/>

17-22: Malkovro de romanika arto en Piktavio (Poitou) kun Claude Nourmont kaj Brian Moon. ☒ Kvinpetalo (v. 6 apr).

21-28: Verda biciklumado en Grezijono (v. 10 apr).

22-31: Busvojaĝo al 6-a Eŭropunia Esperanto-Kongreso en Bilbao. ☒ Esperantotur (v. 10 mar).

25-29: 6-a Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso (EEU-Kongreso) kaj 63-a Hispana Esperanto-Kongreso en Bilbao (Eŭskio-Hispanio). ☒ Grupo Esperantista de Bilbao, Barrencalle Barrena 7 - 1

D, ES-48005 Bilbao, Hispanio. ☎ +34-944-164492, ✉ esperantobilbao@terra.com; www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

septembro

03-06: 72-a Itala Kongreso de Esperanto en Treviso. ☒ Itala E-Federacio, Flavia Del Zilio, via Capella 17/2, IT-31059Zero Branco (TV) Italio, ✉ flavia@dalzilio@esperanto.it; kuniklo@tiscali.it; www.esperanto.it

09-16: Apudbeleto en Esperanto: biografioj, taglibroj, vojaĝrakontoj, leterkolektoj en Boursesse, kun Ed Borsboom. ☒ Kvinpetalo (v. 6 apr).

10-12: NOREK (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco) en Boise, ŝtato Idaho, Usono, ☒ info@terpomoj.org, <http://www.terpomoj.org/>

10-22: 22-a Ĉina Templo Fairo en Jiuhua-monto, Sanktejo de Budhismo. Ritaro por Kŝitigarbha Bodisatvo, Sankta Naskiĝtago por Kŝitigarbha Bodisatvo en Jiuhua monto, Sanktejo de Budhismo, kun Esperanto kiel pontlingvo en Guichi de Anhui provinco. ☒ Liu Jianguo (v. 31 jul).

15-18: 11-a Ĉina Internacia Kultura Festivalo de Toŭfuo/Vegetarajo, 4-a Huainan Bagongshan Turisma Festivalo de Ĉinio kun E-o kiel laborlingvo, okazigota en Huinan-urbo de Anhui-provinco. ☒ Liu Jianguo (v. 31 jul).

19: 7-a Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga. Temo: *Esperanto – ilo por solidara tutmondiĝo*. Aŭditorio de administrejo de Taguatinga. ☒ Taguatinga Esperanto-Klubo, C 12, Ed. Paranoá Center, sala 112, Taguatinga, BR-72010-120 Brasília, DF - Brazilio, ✉ tek.esperanto@ig.com.br

24-28: 30-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo en Bydgoszcz kaj 5-a BUS de AIS kaj 26-a AKB-Sesio. ☒ Esperantotur (v. 10 mar).

25-26: Kultura Semajnfino pri muziko, prelegos (kaj kantos) Geörg Roessler kaj Jean-Thierry von Bueren en Caudefono (provizora). ☒ Kultura Centro Esperantista (v. 27 mar).

26 sept - 26 okt: Internacia Akrobata kaj Cirka Festivalo de Ĉinio kun E-o kiel pontlingvo en Hefei. ☒ Liu Jianguo (v. 31 jul).

oktobro

01-03: 4-a KoKoLoRES (kafoklaĉo- kaj ludo-semajnfino) en Herne, Germanio. Samtempe okazos Esperanto-kurso por komencantoj. ☒ Petra Dückershoff, ✉ petra.dueckershoff@web.de

01-03: XX-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES 2004 en Poznań, Pollando. ☒ Paweł Janowczyk, ul. Zawady 2/7, PL-61-002 Poznań, Polio. ☎ +48-(61)8755879, +48-(602)283242, ✉ janowczykpawel@poczta.onet.pl

01-03: Ora aŭtuno en Žilina, Slovakio. ☒ Juraj Gondžúr, ✉ gondzur@urap.sk

01-07: 55-a Nacia Festo de Ĉina Popola Respubliko, Internacia Wushu/Kongfuo Festivalo de Ĉinio (2004.10.01-05) kaj 5-a Konkurso pri Drakboato (2004.10.01-02) kun Esperanto kiel laborlingvo aŭ pontlingvo, okazigota en Hefei. ☒ Liu Jianguo (v. 31 jul).

02-09: 12-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Salou (Tarragona)

Hispanujo. ☒ Luis Serrano Pérez, Apartat 423, ES-08200 Sabadell, Hispanio. ☎ (+34) 93 727 50 21. ✉ +34 93 731 41 11 (krom aŭgusto), <http://www.terra.es/personal5/serrano>

22-24: Maanshan-a Internacia Vrescicita Festivalo de Ĉinio kaj Ĉina Festo de Duobla Naŭo, festo por Respektata Maljunulo kun Esperanto kiel laborlingvo en Maanshan de Anhui-provinco. ☒ Liu Jianguo (v. 31 jul).

novembro

05-09: STRIGO-10 en Nižnij Novgorod, Rusio. ☒ Irina Gončarova, ✉ mirina@online.ru

20: 6-a Festivalo de Esperantaj Filmoj en Bratislava. ☒ Nataša Šándorová ☎ +421-(0)905-138769, ✉ natasa.sandorova@nextra.sk

decembro

10-11: Antaŭ-Kristnaskaj Vesperoj en Bratislava. ☒ Alica Komlóšiová, ✉ minich@fphl.uniba.sk

27 dec - 03 jan: 21-a Internacia Festivalo (arango por familioj kaj personoj 25 - 55-jaraĝaj) en germana Magdeburg. Kadra temo: *Tradicioj*. ☒ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. ☎/✉ +49-5624-8007, portebila +49-171-4964558. ☒ [HDP@internacia-festivalo.de](http://internacia-festivalo.de), <http://www.internacia-festivalo.de/>

2005

marto

04-08: 4-a Azia Kongreso en Nepalo. ☒ Ĝenerala sekretario, s-ro Bharat Ghimire, P.O.Box 180, Kathmandu, Nepalo. ✉ nespa_bharat@hotmail.com

25-30: Boulogne 2005, Esperanto- Memorfesto okaze de la centjariĝo de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 en Boulogne-sur-Mer, Francio. ☒ boulogne2005@online.fr; <http://boulogne2005.online.fr/eol>

majo

05-08: 82-a Germana Esperanto-Kongreso en Michelstadt /Odenwald (Heslando). ☒ Germana Esperanto-Asocio (v. 28 maj 2004).

julio

09: Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario. ☒ <http://www.bereczki-baja.sulinet.hu/esper/fishsup/>, ✉ bajaj@eposta.hu

23-30: 90-a Universala Kongreso de Esperanto, Vilno, Litovio.



Tute normala progreso II.

Claude Piron

Pasintnumere la aŭtoro, renoma svisa psikologo, aliris la mondan lingvoproblemon el la psikologia vidpunkto, kies graveco, liaopinie, ne estas ĝuste taksata. Jen la daŭrigo.

Rezisto konfirmas la diagnozon

Sed eble vi tamen havas dubon pri tio, ĉu la concerna konduto vere estas patologia, kaj vi bezonas konfirmon pri la diagnozo. Nu, ni scias, ke unu el la karakterizoj de tiaj patologioj estas rezisto. La persono, kiu havas tiajn patologiajn trajtojn, faras ĉion ajn eblan por ne konscii, ke li aŭ ŝi ne agas sane, ke ŝi aŭ li povus agi tute alimaniere, multe pli agrable kaj efike. Kelkfoje la concernato tamen agnoskas, ke tia konduto estas nenormala, sed diras: *Jes, mi scias, ke tiel agi estas strange, nenormale, eĉ patologie, sed alimaniere mi ne povas fari*. Tiun rifuzon akcepti, ke la konduto estas nenormala, aŭ la neeblojn ĝin ŝanĝi, oni nomas rezisto.

Nu, estas interese vidi, ke la maniero, laŭ kiu lingva komunikado estas organizita en nia mondo, havas ĉiujn karakterizojn de patologia konduto. Esperanto ekzistas. Ĝi ebligas komuniki multe malpli multekoste ol samtempa interpretado, multe pli juste ol la angla, multe pli komforte ol iu ajn alia lingvo, kaj tio eblas post multe pli eta investo en tempon, monon kaj energion fare de la komunikantoj kaj fare de la ŝtato. Alivorte, ĝi estas la rekta vojo por kontentigi la bezonon. Sed anstataŭ uzi ĝin, la socio elektas tre komplikajn kaj multekostajn vojojn. Ĝi devigas milionojn da infanoj studi dum jaroj kaj jaroj fremdajn lingvojn tiel malfacilajn, ke nur unu el cent, meznombro, en Eŭropo, unu el mil en Azio, kapablas efike uzi la lingvon fine de la studoj. Post kiam estis investitaj tiom da penoj, da nerva energio, da tempo kaj da mono en tiun lingvoinstruadon, montriĝas, ke oni ne solvis la problemon de malegaleco, kaj ke oni tiel fuŝe atakis la lingvobarilojn, ke necesas investi ree milionojn kaj milionojn da dolaroj por pretigi tradukojn en dekojn da lingvoj kaj por prizorgi la samtempan interpretadon, sen kiu la komunikantoj ne povus interkompreniĝi. Tio estas freneza. Estas freneze uzi sian tempon, sian monon, sian penon en tiel fuŝa, tiel neefika maniero, kiam eblas tion eviti. Jam per tio la socio montras sin patologia.

Sed kio konfirmas, ke temas pri aŭtenta psikopatologio, tio estas la fakto, ke, se vi atentigas pri la afero la ĵurnalistojn, la decidantojn, la gravulojn, la respondeculojn pri la organizado de la socia vivo, kaj provas vidigi al ili, ke la sistemo estas freneza, kaj ke ekzistas mense sana maniero komuniki, multe pli facile atingebla, tiam vi estigas reziston. La homoj rifuzas konsideri vian atentigon, ili rifuzas esplori la aferon, ili forbalaas la atestojn kaj la pruvojn, antaŭ ol konatiĝi kun ili. Tiu vorto *antaŭ* estas grava, ĉar ĝi estas la pruvo, ke la diagnozo estas ĝusta, ĝi atestas pri la rezisto. La respondeculoj de la socio preferas ne scii, ke ekzistas alia maniero komuniki interpopole, ol tiu, kiun ili trudas al la miliardoj da teranoj. Ili timas alfronti la

veron. Kaj ĉar ili ne volas vidi, ke ili timas, kio estas plia pruvo pri la neŭroza, patologia karaktero de ilia konduto, ili uzas ĉiajn pretekstojn por ne malfermi la dosieron. La gravuloj do rifuzas ion ne sciante, ke ili rifuzas; ili timas nesciante, ke ili timas; ili kaŭzas embarason, maljustecon, frustron, kaj nenecesajn penadon, elspezadon, impostojn, komplikajojn ĉiaspecajn, kaj konsiderindan kvanton da suferoj (mi aludas i.a. al rifugiĝintoj, por kiuj la manko de lingva komunikado ofte estas kaŭzo de tre konkretaj suferoj), ili kaŭzas ĉion ĉi ne sciante, ke ili tion kaŭzas. Temas pri vere serioza, severa psikopatologio socia. Sed tre malmultaj personoj tion rimarkas kaj komprenas.

Tabuo

Fakte, tabuo tuŝas la tutan kampon de interpopola kaj interŝtata lingva komunikado. Se vi studas la dokumentojn, kiuj estas produktataj tiukampe, vi konstatas, ke multe pli ol 99 procentoj prezentigas, kvazaŭ Esperanto ne ekzistus, kvazaŭ la homaro havus nenium sperton pri alia maniero internacie komuniki ol la kutimaj per tradukado, interpretado aŭ la uzo de prestiĝa nacia lingvo kiel la angla. Esperanto estas tabua. Oni ree tion vidis en Bruselo, en la Eŭropa Parlamento, dum kunsido de la t.n. Institucia Komisiono, kiu pritraktis la demandon pri (ne)komunikado en Eŭropa Unio. Kio pravas, ke temas pri io tabua, estas la rifuzo kompari.

En scienco, kiam oni volas scii pri la valoro de io, oni ĉiam komparas al referenco. Antaŭ ol decidi pri nova medikamento, oni komparas ĝian efikecon al jam konataj substancoj. Kaj kiam oni decidis fari tiun aŭ alian grandan laboron, ekzemple konstrui novan stadionon, kion oni faras? Oni lanĉas ofert-alvokon. Oni proponas al la diversaj firmaoj submeti projekton, kaj oni komparas la diversajn ofertojn por akcepti la plej rician rilate al ĝiaj kostoj kaj al aliaj kriterioj, kiujn necesas konsideri. Tio estas la normala proceduro. Fakte ekzistas tuta scienca metodo pri la arto decidi elektante la plej bonan manieron atingi difinitan celon. Tiun sciencon metodojn oni nomas *operacia esplorado* (*operations research, recherche opérationnelle*). Ĝi naskiĝis dum la dua mondmilito kiel maniero elekti la plej bonan vojon por transporti varojn aŭ homojn plej rapide kaj kun malplej da risko. Nu, se oni aplikas la regulojn de operacia esplorado al la lingvoproblemo, oni konstatas, ke, el ĉiuj rimedoj nuntempe observeblaj en la praktiko, la optimuma por atingi la celon estas Esperanto. Sed por tion trovi, necesas kompari la diversajn sistemojn unu al la aliaj, do vidi objekte, en la praktiko (surterene, kiel oni nun diras), kiel Esperanto prezentigas kompare al gestoj, al balbutado en lingvo malbone regata, al la uzo de la angla, al tradukado de dokumentoj kaj interpretado de paroladoj, ĉu samtempa, ĉu posta, al uzo de la latina, ktp. Nur tia komparo ebligas konkludi, kiu estas la plej bona sistemo.

Sed kvankam miloj kaj miloj da paĝoj troviĝas en dokumentoj pri la lingva situacio, jen en UN, jen en Eŭropa Unio, jen en lingvikaj fakoj de universitatoj ktp, la dokumentoj, kiuj aliras la problemon surbaze de komparo inkluzivanta Esperanton estas malpli nombraj ol la fingroj de unu homo. Ĉar komparo de la diversaj eblaj solvoj al problemoj estas io tiel ofta alikampe, ĝia foresto en la kampo de internacia lingva komunikado pravas, ke agas tabuo.

En kio radikas la tabuo?

Kial tiu patologia aliro al la lingvoproblemo? Denove la kaŭzoj estas multaj. Estas politikaj kaŭzoj. La ideo, ke la intelektulo plej netalentaj individuoj povu senbare komuniki de popolo al popolo, malplaĉas al multaj ŝtatoj. Estas sociaj kaŭzoj. Tiu sama eblo malplaĉas al la privilegiitaj sociaj tavoloj. Homoj, kiuj scias sufiĉe bone la anglan aŭ alian gravan lingvon, havas multajn avantaĝojn super homoj, kiuj scipovas nur kelkajn lokajn lingvojn, ili tute ne deziras perdi tiujn avantaĝojn. Tio estas aparte videbla en la t.n. Tria Mondo.

Sed mi opinias, ke la ĉefaj kaŭzoj de la tabuo estas psikaj. La kerno de la problemoj kuŝas en la emocia pezo, ŝarĝo, etoso de la koncepto *lingvo*, en ĝia povo vibrigi tre profundajn fibrojn de nia animo. Ni pensas per konceptoj aŭ vortoj. Kaj la vortoj aŭ konceptoj ne estas nur intelektaj aferoj, ili havas ian emocion, ian sentan etoson. Ne ĉiuj, sed multaj. Se mi diras *milito* aŭ *mono* aŭ *patrino* aŭ *sekso* aŭ *atomenergio*, io vibras profunde en vi, kvankam vi tion ĝenerale ne konscias. Alivorte, ni ne estas indiferentaj fronte al granda parto de niaj konceptoj, ĉefe al tiuj, kiuj estas eligitaj al niaj deziroj, bezonoj, spiroj, plezuroj, suferoj, potenco ktp.

Inter tiuj konceptoj kun forta emocia etoso troviĝas la koncepto *lingvo*. Kial? Ĉar la lingvo elvokas la fakton kapabli kompreniĝi sin, kaj la eblo esti komprenata estas unu el la plej bazaj deziroj de ĉiu homo. Kiam mi havas ian turmentan zorgon, aŭ suferon, se mi povas paroli pri ĝi al iu, kiu aŭskultos min kaj reagos kompreni, mi sentos min helpata, okazos ia kundivido de la zorgo aŭ de la sufero, tiel ke mi ne plu sentos min sola, mi fartos pli bone kun ĝi. Kiam bebo suferas kaj krias, tre ofte, pro nekompreno, la reago de la apuda plenkreskulo mistrafas, aŭ tute ne venas reago, krom, survizaĝe, esprimo de senhelpeco. Sed kiam la infaneto akiris lingvon, kaj povas diri: *Doloras al mi en la orelo*, la reago de la plenkreskulo estas tute alia. Okazas vera komunikado, kiu ŝanĝas la vivon. Tial ke tiu komunikado plej ofte kaj plej save disvolviĝas kun la patrino, la emocia etoso de la koncepto *lingvo* inkluzivais la sentojn pri ŝi. Pro tio la plimulto el la lingvoj diras *patrina lingvo*, kiam fakte temas pri la gepatra aŭ la media lingvo.

Fakte, akiri lingvon, estas io tute banala. Tio okazas laŭ la normalaj vojoj de ĉia lernado. Estas nenio pli mistika en lingvoakirado ol en la asimilado de la kapablo regi aŭtomobilon. Tamen estas grandega diferenco inter la du. Por la aĝo. Kiam ni lernas uzi aŭtomobilon, ni scias, ke ni lernas, kaj ni jam scias multegon pri la arto lerni, ĉar ni vizitadis lernejon multjare kaj lernis multon pri lernado. Sed kiam ni akiras la gepatran lingvon, ni absolute ne scias, ke ni lernas. Ni do vivas la aferon kiel miraklan. Antaŭe ni ne povis klare komuniki. Nun ni povas esprimi nin. Jen miraklo, kiu ŝanĝas la tutan vivon. Por tiuj cirkonstancoj, en kiuj ni akiras lingvon, lernante sen scii, ke ni lernas, ke disvolviĝas tute banala lernprocezo, la lingvo fariĝas io sankta, io fea, io fabela, io mita. Io, kio situas ekster la kampo de racio. Io, pri kies deveno ni scias nenion. Por la plejprofundo de nia animo, lingvo estas donaco de la dioj, donaco supernatura. Neniu homo rajtas ŝanĝi ĝin. Neniu rajtas libervole kaj racie enmiksi sin en ion lingvan.

Vidu, kiel emocie la homoj reagas, kiam aperas propono ŝanĝi la ortografion. Rigardu atente la argumentojn, kaj vi vidos, ke nenio vere racia intervenas tie. Temas simple pri emocioj, la emocioj, kiujn ĉiam vibrigas la koncepto *lingvo*.

Kaŝita aŭtoritata mesaĝo

Tiu kerna sento pri lingvo kiel io mita, donita de la dioj, kaj do sankta kaj netuŝebla, estas la plej kerna ero de la emocia aŭro de la koncepto *lingvo*. Al tiu kerno aldoniĝas la fakto, ke la koncepto *lingvo* elvokas la plej unuajn rilatojn en la familio, ĉefe tiujn kun la patrino. Sed super tiuj du tavoloj alvenas tria:

la rilato kun aŭtoritato. En la transdono de lingvo al infanoj, estas kaŝita mesaĝo, kiun oni praktike neniam eksplicas. Kaj tiu mesaĝo estas terure dikta-tora.

Fakte ĝi diktas la respektivan situacion de infano kaj plenkreskulo en la socio. Kiam infano parolas neĝuste, oni korektas ĝin, almenaŭ ek de kiam ĝi vizitadas lernejon. Se oni ne korektas ĝin, oni ridas aŭ mokas, aŭ ridetas signife. Ĝia ajn la reago, ĝi sentigas al la etulo, ke, kiam ĝi uzas tian formon, diferencan de la gramatike aŭ vortare ĝusta, ĝi troviĝas ekster la normo. Se eta franclingvano diras *plus bon*, oni diras al li: *Ne tiel oni diras, oni diras "meilleur"*. Eble ankaŭ en la germana oni ne rajtas diri *mehr gut* aŭ *guter* aŭ *gueter* kaj verŝajne infanoj uzas tiajn formojn. Tiam oni ilin korektas per frazo kiel: *Ne tiel. Oni diras "besser"*.

Kion tio signifas por la profundo de la psiko? Tio transdonas kaŝitan mesaĝon, jene: *Ne fidu vian spontanatan, naturan tendencon, kiu igas vin ĝeneraligi lingvan trajton, kiun vi rimarkis. Ne fidu vian logikon. Ne fidu la racion. Ne fidu viajn refleksojn, vian instinkton. Ne fidu vin mem. Obeu nin, eĉ se nia sistemo estas absolute neracia, malsaĝa*.

Por la infanoj ja la lingvo estas esence komunikilo. La unua ŝtupo en ilia pensado do estas: *Se oni komprenas min, estas en ordo. Lingvo ja estas farita por ke ni interkompreniĝu. Sed la reagoj de la medio pli kaj pli sendas la mesaĝon: Lingvo ne estas io elpensita por interkompreniĝi. Lingvo estas kampo, en kiu oni lernas konformiĝi sin al la arbitraj, neklarigeblaj postuloj de la grandularo*. En lingvo estas tabuoj, kiujn neniu povas pravigi. Se infano, kiu volas esprimi la ideon *li venis*, diras *er kommt*, il a *venu*, he *comed*, oni atentigas ĝin, ke ĝi devus diri *er kam*, il *est venu*, he *came*. Se tiam ĝi demandas: *kial?* Ne eblas doni al li la rician respondon. Oni povas nur diri: *Ĉar estas tiel*. Kaj tio subkomprenigas, ke la lingvo estas io regata de nekompreneblaj leĝoj, neniam klarigataj, kiuj radikas en la pratempro. Respekto al la praavoj aŭ al la dioj, kiuj donis la lingvon, estas pli grava ol logiko, ol racio, ol tendencoj spontanaj, instinktaj, do ol individua homa naturo.

Esperanto fuŝas ĉion ĉi. Ĝi naskiĝis antaŭ ne tre longe. Tio estas sakrilegio. Lingvo ne rajtas esti juna. Lingvo estas io sankta, transdonita de la praavoj aŭ de la dioj, ne io, kio povas estiĝi nuntempe. Kaj oni diras, ke tiu lingvo ne havas esceptojn, tio estas krimo! Se oni povas sekvi sian naturon, sian sanktan, fean karakteron. Ĝi relativigas ĝin, dum viglas emocia bezono, ke la gepatra lingvo estu io absoluta. Necesas ĉiarimede haltigi ĝian disvastigon. Kaj necesas ĉiarimede agi, por ke oni ne esploru pri ĝi. Oni eble vidus, ke lingvo ne estas tio, kion ni kredas, kaj tiel oni subfosus la bazon de la sociaj rilatoj. La afero estas tro emocia, por ke oni akceptu trankvile, objekte, science studi ĝin. Kaj trankvile, objekte studi la reagojn al ĝi.

Monstro

Krome, Esperanto aperas kiel monstro, ĉar oni diras, ke ĝi kreis unu viro. Alivorte, ĝi havas patrinon, sed ne patrinojn. Ĝi estas la monstra produktaĵo de iu soleca perversulo. Al tiu ideo kontribuas multaj difinoj, troveblaj en vortaroj, enciklopedioj, prilingvaj libroj aŭ esperantistaj informiloj, laŭ



kiuj *Esperanto estis kreita de Zamenhof en 1887*. Fakte, Esperanto ne kreiĝis en 1887. En 1887 aperis semo de lingvo, kiu dum multaj jaroj kreskis kaj transformiĝis en la menso de Zamenhof kaj sur liaj kajoroj. Post tiu longa procezo, kiu estas komparebla al la procezo per kiu laŭgrade kreiĝas semo en planto, la projekto publikiĝis, tio signifas, la semo estis ĵetita. Sed tiu semo povis iĝi io vivanta nur se grundo akceptis ĝin. Kaj tiu grundo estas la patrino de Esperanto, tio estas la komunumo de tiuj unuaj vastkoraj idealistoj, kiuj akceptis la semon, kaj provizis ĝin per la medio, en kiu ĝi povis kreski, transformiĝi kaj fariĝi io sufiĉe vivkapabla por vivteni sin sendepende de iu ajn individuo.

Esperanto, kia ni uzas ĝin nun, ne estas la verko de Zamenhof, ĝi estas lingvo, kiu disvolvigis surbaze de la projekto de Zamenhof per jarcento da konstanta uzado inter homoj ege diversaj. Ĝi estas lingvo, kiu disvolvigis tute nature, per uzado, per verkado, per alternativo de proponoj kaj kontraŭproponoj, plej ofte nekonsciaj. Ĝi ne estas monstro, kiun estigis iu homo sola, ĝi havas patron, jes ja, mirindan patron, patron, kiu sukcesis meti en ĝin nekredeble taŭgan vivpotencialon, sed ĝi havas ankaŭ patrinojn, kiu flegis ĝin ame, kaj kiu, multe pli ol la patro sola povis, donis al ĝi vivon.

Faktoj estas pli obstinaj ol paroloj

Vi vidas, ke la psikologiaj aspektoj de Esperanto, kaj de la monda lingvoproblemo, estas multe pli kompleksaj ol oni unuavide imagus. En la psiko de la plej multaj individuoj troviĝas terura rezisto al la ideo mem de lingvo internacia. Pro tiu rezisto, preskaŭ neniu en la politika, socia kaj intelekta elito akceptas serene esplori la aferon. Kaj tamen ĝi progresos. Similaj kazoj de rezisto al io pli bona, pli oportuna, pli demokratia abundas en la historio. Plej tipa ekzemplo estas la rezisto en Eŭropo, kontraŭ la ciferoj, kiujn ni nun uzas, la hindaj/arabaj ciferoj; ankaŭ ilin la intelekta elito (kaj ne nur ĝi) sentis sakrilegio kontraŭ la romiaj ciferoj ĝis tiam uzataj. Mi estas konvinkita, ke Esperanto estos ĝenerale akceptita iam. La patologio ne eterne estos pli forta ol la kuracaj fortoj, ankaŭ kiuj agas en la socio. Inter tiuj kuracaj fortoj estas la pli kaj pli bona kompreno de la fenomeno Esperanto fare de lingvistoj, ekzemple, kaj de multaj aliaj personoj. Estas ankaŭ la postuloj de la realo. Kiel

diris Lincoln oni povas kaŝi la veron al parto de la publiko dum parto de la tempo. Oni ne povas kaŝi la veron al la tuta publiko dum la tuta tempo. Esperanto, se oni komparas ĝin al ĉiuj aliaj rimedoj intergente komuniki, estas objektivite la plej bona, per tre granda distanco, por ĉiuj kriterioj. Faktoj estas pli obstinaj ol ideoj. La rezisto plu daŭros kaj estos akra, jes ja, certe, eĉ se nur ĉar oni povas percepti ion nur kiam oni estas tiurilate preta, tiel ke, nuntempe, multaj homoj simple ne aŭdas, kion vi diras pri Esperanto: ilia menso ne estas preta, do viaj frazoj preterpasas sen penetri ĝin. Jes, la rezisto plu estos forta. Sed, kredo min, ĝi ne povos superi. La faktoj venkos. Vero venkos. Esperanto venkos.

(fino)

Claude Piron

VIZITU VIAN PROPAN DOMON
ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabato la 24-a de aprilo 2004 (10h00-17h00)



Zofia Banet-Fornalowa
pri *Stato de nia historio-grafio kaj Vivo de Lydia Zamenhof*



István Ertl kaj aliaj podianoj diskutos pri *Eŭropo: Sur nur-angla lingva fundamento...? de R. Phillipson*

● 10%-a rabato en la libroservo ● ekspozicio de valoraj el la historio de Esperanto ● senpagaj kafo kaj teo

● lerni interkulture ● lerni interkulture ● lerni interkulture ● lerni interkulture ●

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)

- trisemajna intensa lernado de Esperanto
- por komencantoj ĝis akademianoj
- internaciaj instruistaro kaj studentaro
- riĉa vespera kaj semajnfina programo



NASK 2004 okazos denove ĉe la monde konata interkultura altlernejo *The School for International Training* en nordorienta Usono. La instruista skipo pretigas trinivelan studprogramon kiu emfazas aktivan uzadon de Esperanto en interkulturaj komunikado, kompreno kaj kunlaboro. Krome estos speciala seminario por Esperanto-instruistoj pri modernaj instrumentodoj.

Datoj: 5-23 julio, 2004

Loko: Brattleboro, Vermonto (facile atingebla de Bostono, Novjorko aŭ Hartfordo)

Instruistoj: d-ro Duncan Charters (Usono), d-ro Katalin Kováts (Hungario/Nederlando) kaj Lee Miller (Usono)

Kotizoj: loĝado en dultaj ĉambroj kun manĝoj 700US\$; kurskotizo 980US\$.

Stipendioj haveblas.

Por pliaj informoj: <http://www.nask-esperanto.org>, aŭ skribu al la kunordiganto: Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512; tel. (360) 754-4563; fakso: (360) 786-9175; retpoŝto eddyellen@aol.com

Recenzoj



Nova libro de produktema amato

Konciza etimologia vortaro. André Cherpillod. Roterdamo: UEA, 2003. 503p. ISBN 92 9017 082 4. 21cm. Prezo: € 19,80 (broŝ.), 24,90 (bind.). Triona rabato ekde tri ekz.

Jen nova libro de la produktema Cherpillod, kiu rangos kun tiu de Vilborg kiel unu el LA du etimologiaj vortaroj de Esperanto. Rimarkinde estas ke tiu verko estis aŭtorita de "amatoro". Oni ĝenerale fidas nur profesiajn instruistojn, t.e. profesorojn: tiu banala vero ne validos post Cherpillod. Oni subite konsciĝas ke Markso mokis profesorojn, kaj ke Markso kaj Ricardo kaj Quesnay estis amatoj, en lingvistiko ankaŭ Benjamin Wharf estis tia.

Unu el la karakterizaĵoj de tiu ĉi vortaro estas ke la etimoj estas donitaj en siaj originalaj literaj kostumoj, kaj la aŭtoro mem pri tio fieras. Tio tamen ne estus saĝa, la Esperanta leganta publiko ne estas tiel vasta; kiam estus kiuj sentas sin komfortaj pri tiuj esoteraj signoj? Kiuj scias kompreni ilin, povas facile diveni la originajn se vestite latine. La efiko ne justigas la koston. Ties alia kvalifiko estas ĝia koncizeco, kiel la titolo montras: el kio la denseco de ĝia enhavo, aŭ informokvanto.

Ĉiuj ne povas ne admiri la erudicion de la aŭtoro, sed malicaj legantoj pensus ke tio ne necese signifas kreemon kaj ke temas nur pri fizika streĉado. Ne, ne, tio estus sakrilegio. Erudiciuloj ekspozicias kion ili elĉerpis el miloj kaj dekmiloj da libroj. Tiaj libroj estas oportunaj en tio ke ili ŝparigas la penon de ordinarnaj homoj: kompreneble tio estas jam grandega atingo kaj meritas la dankon de la publiko. Tiu ĉi recenzianto estas unu el tiuj dankantoj. La promena foliumado estas vera ĝuo simila al la gastronomio.

Oni ofte neglektas la neceson de la serĉo pri la enirovoj de tiuj etimoj en Esperanton. Pensu pri la pionira klopodo de la aŭtoroj de la oksfordaj vortaroj. Ili ne vane portas la ŝildon "sur historiaj principoj": oni precize povas scii kio estis la plej malnova dokumenta spuro de iu ajn angla vorto - "ajn" estas kompreneble troigo, mi prolepse aldonu. Ankaŭ Esperantujo bezonas sian oksfordan. La Oksforda ne estas etimologia vortaro, ĝi estas ĝenerala vortaro, ne por specialistoj sed por ĉiuj kleraj amatoj, kiel estas Sekspiro, kiu ne estas por ŝekspirologoj. Rememorante tion, oni ekscias la taŭgecon de la aserto de Cherpillod ke vortaro sen etimologio ne estas vortaro. Jes tio estas Robert kaj Brockhaus, se ne paroli pri Grimm. En Esperantujo aperas konkurence pli kaj pli grandaj naciaj-Esperantaj vortaroj kaj inverse, sed ili nur trumpetas pri la nombro de klapvortoj: pli grava kaj interesa estas la progreso de la metodo (la recenzianto opinias ke la metode vere progresinta vortaro estus la Esperanta-japana vortaro redaktata de komitato de dek lingvo-sciencistoj kaj -uzantoj, sed bedaŭrinde post atendado de dek jaroj ni eksteruloj ne scias kiam ĝi estos preta nek, por la japana tradicio eviti nomi la kulpintojn, kio kaŭzas la prokraston - tiu komitato severe ekskluzivas etimologion, cetera). La elstara efikeco de leksikografiaj atingoj de Cherpillod konsistas en tio ke li laboras kiel sola lupo, ne ĝenate de komitato.

Iu asertas ke Esperanto ne postvivis la jaron 2045. Restas tamen arĥeologia tasko dokumenti la historion de estiĝo kaj

formorto de la fenomemo Esperanto, ĝuste kiel oni esploras kaj rekreas tiun de dinosaŭroj. La klopodoj de Esperantaj etimologoj tial ne estas vanaj.

Profesoroj rikanas la scivolemon de amatoraj legantoj Esperantaj, asertante ke post la vortaro de Vilborg restas nenio por diri, krom peano al Profeso Vilborg, pri etimologio en Esperantujo kaj ke la tempo speziata pri ĝi estas komplete senutila, sed vidu, kiom granda estas la amaso da dinosaŭr-amantoj. Tia hobbio kontribuas multe pli al la eŭforio de la cirk-postulanta plebo ol instigado de militoj kontraŭ la imperioj de la malbono. Je la fascino de Volapuko, kiu altiras grandan nombron da eminentaj esperantistoj, la recenzianto nur gapas: Volapuko neniam estis o sociologio (tiu uzo de la vorto "o" estas de PIV2, Wŭster kaj aliaj), kio estas Esperanto, kaj ne meritas esti objekto de arĥeologio.

Sajnas ke oni pensas ke Esperantaj radikoj estis rekte enkondukitaj el la fontlingvoj kaj ne dubas la taŭgecon de tiu ĉi metodo en etimologio. Prenu tamen ekz. la vorton *katedralo*.

Ĉiu sentas ke tiu vorto havas parencecon kun *katedro* kvankam profesoroj malpermesas kredi alie ol ke ili estas sendependaj unu de la alia. Tiu sento de amatoroj estas sana kaj natura, kaj oni povus pensi ke la unua estas derivita de la dua per la sufiko -al/, kiu troviĝas jam en Wŭster, poste Karolo Piĉ (li diras ke li ne estas naturisto sed skemisto kaj ke Esperanto estas kibernetika lingvo, kiu reproduktas sisteme lingvajn formojn), kaj André Albault legitimis ĝin per civitaneco. Pensante tion, oni povus hipotezi ĝis ia grado memsufiĉecon de etimologio ene de Esperanto. Bagatelaĵoj (kvankam la supraj ne estas malbagatelaĵoj).

La aŭtoro ekzekutas Bastien per unusola svingo de glavo: nur kompara, ne etimologia.

recenzianto kore dankas la bonan generalon Bastien pro tio ke la lia restis longe la sola tia en la tuta Esperantujo, same kiel la Vortaro de Esperanto de Kabe plenigis la breĉon ĝis la alveno de PV.

Estas ĝojige ke li konsciencie atentas pri la kvanto de la vokaloj: la recenzianto miris je la indiferento de eŭropanoj - ne profesoroj sed ordinarioj - pri tiu punkto krom, eble, ĉe la germanoj kiuj havas longan kaj mallongan vokalojn foneme distingitajn (Robert kaj Webster ignoras ĝin). Pri la helena, li ne estas tiel asidua kiel pri latino, ekz. *luo* s.v. ne *sub voce* sed *sub la vorto, parolizi*. Kiel Homero li ankaŭ detestas: ekz. *omnes* kun senmakrona e, s.v. *omnibus* (makrono, longvokala signo, ne estas en PIV2 sed jes en la ŝerpiĵoda, aŭ ŝerpiĵoa). Ankaŭ bona estas markado de la akcento en la rusa, kaj distingo de la larĝa kaj mallarĝa e kaj o en la itala.

Sporade trovataj skatoletoj da notoj kiel *homonimoj* fine de la litero H estas oportunaj, kompreneble por ŝtopi la vakuum de restanta blanka spaco sur folioj, sed la hebrea alfabeto ne estas trovebla rilate al H sed ĉefine de F. Diabolo scias kiel.

Yamasaki Seikō


Faktoplena verko pri la litova historio

Litovio dum jarcentoj. Ilustrita historia skizo. Petras Čeliasukas. Kaunas: Litova E-Asocio, 2002. 144p. ISBN 9986 10 1107. 20 cm. Prezo: € 6,00.

Kiam la greka nacia teamo korbopilks kontraŭ la litova dum iu internacia ĉampioneco antaŭ kelkaj jaroj, la greka komentariisto miris pri la simileco inter la finaĵoj de grekaj kaj litovaj nomoj, proponante rektan (lingvistikan) parencecon kiu ligus ambaŭ popolojn. Kvankam la novaperinta libro de Petras Čeliasukas *Litovio dum jarcentoj* prezentas nenian hipotezon pri tia ligo en siaj 144 paĝoj, vi trovos ke ĝi koncize prezentas la tutan historion de tiu eks-Soveta kaj baldaŭ estonta EU-membroŝtato.

La libro komenciĝas per komentoj pri la antikvaj popoloj, kiuj vivis ĉe la Balta Maro antaŭ 12 jarmiloj kaj finiĝas per detaloj pri la nuntempa politika situacio en Litovio. Preskaŭ triono de la libro estas dediĉita al la batalo de la litovoj por sendependeco dum la 20-a jarcento.

Simpatiantojn de la soveta reĝimo mi konsilus preterlasi tiun sektion. La aŭtoro certe ne ekzamenas tiun periodon el la tradicia marksista vidpunkto kaj li evidente ne kredas ke la suferoj de ĝia popolo estas forgesindaj aŭ nemenciindaj.



La ceteraj paĝoj ekzamenas la litovan historion el politika kaj milita vidpunktoj koncentriĝante sur la agoj de reĝoj kaj estroj kaj prezentante la kulturan produktadon de Litovio nur supraĵe. La libro plenas je bildoj kaj desegnaĵoj kiuj permesas la tekston vivi, kvankam mankas anekdotoj laŭ la herodota stilo. Tamen, oni povas trovi diversajn informojn kiuj fojfoje ŝajnas humuraj aŭ simple strangaj. Ekzemple, mi kredas ke la antaŭnelonge elektita estro de Kalifornio tremante legus ke ekstermantoj aperis en Litovio tuj post la 2-a mondmilito. Persone, mi ne komprenas kial la litova lingvo bezonas 258 sinonimojn de la vorto ĉevalo, sed tio eksplikus kial blanka ĉevalo aperas en la litova blazono!

Generale, *Litovio dum jarcentoj* prezentas mallongan, faktoplenan version de la litova historio, kiu enkondukas la leganton al la konfliktoj kaj problemoj, kiuj turmentis Litovion kaj ĝiajn najbarojn dum multaj jarcentoj. La sola problemo estas ke la aŭtoro evitis uzi konjunkciojn inter frazoj kaj, en kelkaj okazoj, tio rezultigas sintaksan idiotismon.

Efthimios Mavrogeorgiadis

Zamenhof vivas

La Zamenhof-strato. Roman Dobrzyński. Verkita laŭ interparoloj kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof. Kaunas: Ryto varpas, 2003. 288 p. ISBN 9955-9635-1-4. 21cm. Bind. Prezo: € 18,00.

La Majstro estas la plej konata Zamenhof. Sed pli videbla, ĉar reale ekzistanta, estas lia nepo, nome doktoro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, kiu preskaŭ regule partoprenas la Universalajn Kongresojn. Tiu ĉi libro unufoje prezentas lian vivon. Roman Dobrzyński proksimigas lin al ni en la formo de intervjuo. Ili komencis interparoli en 1993 en Litovio, helpe de bongusta loka miel-likvoro. La rezulto estas ekscite interesa.

Esperanto ne estis jam metita en la lulilon de Ludoviko. Sed en 1934 la gepatroj ruze promesis kunpreni lin al la UK en Stokholmo, se li, tiam 9-jara, lernos la kongresan lingvon. Li faris – kaj kaptiĝis de la esperantista etoso. Sekvis la partopreno en pliaj kongresoj. Kiam en 1937 la UK okazis en Varsovio, Ludoviko ne povis sci, ke tie li lastfoje ludas la rolon de eta princo en Esperantujo. Du jarojn poste germanaj trupoj invadis Pollandon, la nazioj arestis kaj poste ekzekutis Adam Zamenhof, la patron. La filo diras: *Neniam mi povis liberiĝi de la konvinko, ke pro sia nomo pereis mia patro.* Wanda, la patrino, kaj Ludoviko enpreniĝis en la varsoviaĵon. De tie la du filinoj de la Majstro, Zofia kaj Lidja, estis en 1942 transportitaj al la nenigejo Treblinka. Tiu sorto minacis ankaŭ al Ludoviko, sed dank' al feliĉa hazardo li sukcesis eskapi de la "transŝarĝa placo" kaj reveni unue al la getto, antaŭ ol li kaj la patrino dank' al falsaj identigiloj (laŭ kiuj li nomiĝis Krzysztof Zaleski) povis sin kaŝi ekster Varsovio.

Pri la varsovia getto ekzistas abunda literaturo. Tamen, ĉar ĝi estis surtera infero, atestoj de transvivintoj troviĝas

nur en limigita nombro. Tial la memoroj de la nepo estas spirhaltige interesa legaĵo. Min ili multloke memorigas pri la aŭtobiografio de alia eskapinto el la varsovia getto, la recenzisto Marcel Reich-Ranicki. Lia libro en 1999/2000 furore vendiĝis en Germanio.

La libro havas la titolon *Zamenhof-strato*. La n-ro 9 de tiu strato en Varsovio iam portis la domo, en kiu loĝis Lazaro Zamenhof. En 1942/43 la strato kondukis centmilojn da judoj en la direkto de vagonaroj al Treblinka. Pri tio enkonduke memorigas la nepo, kiu esprimas la esperon, ke *virtuala Zamenhof-strato* konduku la homaron al toleremo, al kompreno, al frateco. La unuopaj postaj ĉapitroj priskribas la vojon, kiun la intervjuito iris post la milito. Li studis la konstruĝenieran sciencan kaj, post sia translokiĝo al Francio, komencis imponan profesian karieron, dum kiu li tutmonde akiris reputacion kiel specialisto pri pontoj kaj artefaritaj insuloj. *Prembetono fariĝis parto de mia vivo...* Ankaŭ tiu flanko de la nepo estis preskaŭ nekonata inter la esperantistoj.

Malkovrante ĝin nun, ili kun plezuro legos la memorojn pri vojaĝoj al ekzemple Brazilo kaj Japanio, la enŝovitajn anekdotojn kaj diversajn trafajn komentojn pri la forpasinta komunisma sistemo kaj pri la nuna mondo. Ni multon (re)lernas pri la historia fono de Esperanto, al kiu estas ligita ankaŭ la persono de Ludoviko Zaleski-Zamenhof. Mi ĝis nun ne legis tiel klaran kompakten prezenton de la signifo, kiun kun sia plurismo de lingvoj kaj religioj havis la Litova-Pola Regno en la historio de orienta Eŭropo kaj aparte por la estiĝo



Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Anstataŭoj por keramikaj krudmaterialoj. Edouard Bastarache. Sorel-Tracy: La aŭtoro, 2003. 299p. ISBN 2 9805901 7 7. 28cm. Ringe bind. Listo de materialoj, kun ingrediencoj kaj kvantoj. € 43,50

Dancante kun Barbanjo. Edwin Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 1997. 20p. 22cm. Kuplektiĝo de rememoroj el la lernejana kaj, poste, la instruista vivo de la aŭtoro. € 2,40

Diamanto tiel granda kiel Richotelo. La. F. Scott Fitzgerald. El la angla trad. E. Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 1999. 30p. 22cm. Novelo, kiun la siatempaj kritikistoj trovis konfuza, *blasfema kaj riproĉinde satira pri la riĉularo.* € 3,90

Eniĝmo de l' ar@neo. La. Abel Montagut. Viena: IEM, 2003. 279p. ISBN 3 01 000030 8. 23cm. Anonima mortminaco estas la bazo de ĉi tiu kolekto de retmesaĝoj – romano kvazaŭ ludo de speguloj konkavaj kaj konvexaj. € 18,30

Esu Esperanto eilinis. Aloyzas Urbonas, Povilas Jegorovas. Vilnius: Eldona Instituto pri Sciencaj kaj Enciklopediaj Libro, 2003. 175p. ISBN 5 420 01528 5. 22cm. En la litova. Ilus. Kolekto de konversacioj kaj intervjuoj kun famaj esperantistoj de Litovio kaj eksterlando. € 12,00

Hispana, kataluna, mangada. Verkoj de Dil Avia. Dil Avia (Hirai Jukio). Antaŭparolo U. Lins. Oosaka: Riveroj, 2003. 137p. ISBN 4 947691 18 2. 21cm. Ilus. Kolekto de eseoj, studoj kaj noveletoj dise aperintaj en E-periodaĵoj. € 7,50

Leteroj el Svedio. Harold Brown. Londono: Londona E-Klubo, 2003. 46+4p. ISBN 0 902756 19 2.

21cm. Leteroj de brito loĝanta en Svedio, unue aperintaj en la *Bulteno de la Londona E-Klubo*. € 5,70

Literatura konkurso "Liro". Poezia antologieto 1982-2002. Div. Kompilis A. Korjenkov. Kaliningrad: Sezonoj, 2003. 24p. 20cm. Ĉirkaŭ 30 originalaj poemoj. € 2,10

Lumo nutranta, La. Sciencifikcia romaneto. Endre Dudich. Budapeŝto: HEA, 2003. 106p. ISBN 963 571 471 8. 21cm. Ĉu la Homo povus nutri sin el sunlumo, akvo kaj karbondioksido, kiel la verdaj plantoj? € 8,40

Mia kontrabandulo. Louisa May Alcott. El la angla trad. E. Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 1998. 20p. 22cm. Kortuŝa rakonto pri kredo, amo kaj raso. € 2,70

Osm let na cestách po naši planetě. Maryvonne kaj Bruno Robineau. El Esperanto trad. J. Drahotová. Praha: Volvox Globator, 2003. 170p. ISBN 80 7207 514 4. 21cm. Ilus. Ĉehlingva versio de la populara vojaĝlibro *Ili vivis sur la tero*. € 16,80

Pasaulinés kalbos beiĉskant. Aleksandr Duliĉenko. El la rusa trad. Ramutė Justina Kiburytė. Vilnius: Eldona Instituto pri Sciencaj kaj Enciklopediaj Libro, 2003. 159p. ISBN 5 420 01526 9. 22cm. En la litova. El la serĉado de la universala

lingvo aŭ interlingvistiko por ĉiuj. € 9,00

Plansprachen und elektronische Medien. Kompilis D. Blanke. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 2003. 201p. ISSN 1432 3567. 30cm. En la germana. Pli ol 10 kontribuoj al la jara kunveno de la Asocio por Interlingvistiko, 6-8 decembro 2002. € 21,00

Porjunularaj rakontoj. Boris Jitkov. El la rusa trad. A. Kerbel. Hajfo: La tradukinto, 2004. 205p. 21cm. Ringe bind. 8 rakontoj precipe, sed ne nur, por gejunuloj. € 9,90

ProCom '98. Sektion 3 – Terminologiewissenschaft und Plansprachen. Kompilis D. Blanke. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 2003. 160p. ISSN 1432 3567. 30cm. En la germana. Sep kontribuoj al la Internacia Konferenco Professional Communication and Knowledge Transfer, Wien 24-26 aŭgusto 1998. € 17,40

Sinjorino Braknelo sinjoriĝas. Edwin Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 1997. 14p. 22cm. Pri la spertoj de freŝa universitata instruisto meze de la pasinta jarcento. € 2,40

Tri noveloj. Sherwood Anderson. El la angla trad. E. Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 1999. 26p. 22cm. Enhavas: *La morto en la arbaro*, *La reveno*, *La perdita romano*. € 3,90




Verdirvortoj. Rudolf Steiner. El la germana trad. Willy Nüesch. Berno: La tradukinto, 2003. 239p. 21cm. Antropozofiaj-eŭritmiaj poemoj + enkonduka parolado de la aŭtoro (1915). € 18,00

Via amiko dinosaŭro / Libro de leono. Jeronimas Laucius. Ilustris Jūratė Lekaitė, Rima Stasiūnaitė. El la litova trad. G. Degėsys. Vilnius: Trys žvaigždutės, 2003. 24p. ISBN 9955 454 69 5. 29cm. Dinosaŭroj serĉas parencojn sur la Tero por, fine, fariĝi herooj de libroj. Pro miskompreno la leporo fariĝas reĝo de la arbarbestoj kaj eknomiĝas leono. € 6,00

KOMPAKTDISKOJ, VİDBENDO, POŝTKARTO

Amu min. Jomart kaj Nataŝa. Spānga: Jomart's Studio, 2003. 44 min. Kun tekstfolio. 12 kantoj laŭ poemoj de Mikaelo Bronŝtein. KD. € 18,00

El malproksima helo. Oraj kantoj 4. Red. M. Bronŝtein, G. Kokoliĵa. Kantas: Koĉetkova, Sokolva, Zvereva, Bronŝtein, Dadaev, Obrezkov, Osokin, Vorobjov.



Post la tre sukcesa eksperimento en Gotenburgo, denove en Pekino la unua kongresa dimanĉo estos dediĉita al serio da kunsidoj kaj seminarioj pri klerigaj temoj. La celo de la tago estos doni al la kongresanoj novajn sciojn pri la Esperanto-movado kaj rilataj demandoj, kaj liveri al ili okazojn mem alporti siajn sciojn kaj ideojn. La oficiala inaŭgura ceremonio do okazos, kiel en Gotenburgo, en lundo.

Por la kleriga dimanĉo ni antaŭvidas seriojn da aranĝoj tra la tuta tago sub unu el kvar ĝeneralaj temoj: *Movado, Kulturo, Historio kaj Lingvo*. La aranĝoj daŭros principe 60 aŭ 90 minutojn kaj kutime havos plurajn prezentantojn. Ni volonte ricevos proponojn de homoj, kiuj intencas aŭ konsideras partopreni la kongreson kaj pretus gvidi tian sesion aŭ alimaniere partopreni. Tiuj proponoj prezentu per kelkaj frazoj la temon de la proponata aranĝo, la rolojn, kaj la metodon de agado. Ni ankaŭ ŝatus aŭdi de unuopuloj, kiuj sin proponas por partopreni sesion, kiun ni mem aranĝu.

Ekzemple, povus esti, ke difinita landa asocio faras interesan kaj imitindan informan kampanjon. Ĝi povus fari al ni proponon pri sesio por prezenti tiun kampanjon al la publiko. Povus esti, ke verkisto havas ion interesan por diri

pri la verkado, aŭ tradukisto pri la tradukado, aŭ fakulo pri publikaj rilatoj pri nia ekstera agado. Aŭ povus esti, ke iu persono havas ion novan kaj interesan por diri pri la historio de Esperanto, pri la Esperanto-literaturo, aŭ pri iu aspekto de la lingvo. Tiu homo proponu sin – aŭ mem kontakti aliajn interesajn homojn kaj formu grupon de prezentantoj.

Mallonge dirite, la kongresa dimanĉo estu tago kiam homoj kun ion vere interesa por diri havu okazon prezenti ĝin al la publiko.

Kompreneble ni ne povos akcepti ĉiujn proponojn, kaj nia decido baziĝos ne nur sur la meritoj de difinita propono, sed ankaŭ sur la ĝeneralaj konturoj de la tago. Sed bonvolu ne superflue modesti: se vi havas ion interesan por prezenti, proponu vin (aŭ proponu, ke ni mem kontakti homojn indajn kaj eble persvadeblajn).

Delegitaj de la estraro de UEA por trakti la proponojn (en kunlaboro kun la Konstanta Kongresa Sekretario) estas Humphrey Tonkin (tonkin@hartford.edu) kaj Michela Lipari (michela.lipari@esperanto.org). Prefere retroŝtu al tiuj du aŭ sendu al ili aerpoŝtan leteron (adresojn vi trovos en tiu ĉi numero de la revuo) kiel eble plej baldaŭ. HT

La pekina UK komenciĝos denove per kleriga dimanĉo



Pekino, Ĉinio
24-31 julio 2004

64

de Esperanto – signifo, kiu faras tiun iaman uniĝon de Pollando kaj Litovio pramodelo de la eŭropa integriĝo.

Tra la tuta libro historiaĵoj reviviĝas, akirante gravecon por la nuntempo. Kion la avo iam celis, tio laŭ la nepo konservas validon. Krom kompreneble Esperanto, ankaŭ la ideoj de la Majstro pri proksimiĝo de nacioj kaj religioj restas aktualaj kaj parte jam trovis konfirmon en la Deklaracio pri Homaj Rajtoj kaj la Eŭropa Unio. Pri tio inspire rememorigas la nepo, la projektinto de pontoj, kiu, nun pensiita, konvinke pledas por la konstruado de multaj *pontoj de l' espero*. Kiu povus pli kredinde proponi tion ol ido de Lazaro Zamenhof, ol homo, kiu rigardis en la abismon de homa malbono, sed ne perdis la fidon al pli bona homaro? Ulrich Lins

Moskvo: REU, 2003. 54 min. 24 kantoj, parte tradukitaj/adaptitaj, popularaj inter rusiaj esperantistoj. KD. € 13,50

Kelkaj kantoj por miaj ĝeamikoj. Kantas Jan Strydom, baritono. Pretoria: J. Strydom, 2003. Kun 16-paĝa broŝuro. 68 min. 32 muzikaĵoj el diversaj partoj de la mondo, kantitaj en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto. KD. € 6,90

Ludovikoj en Brazilo. Roman Dobrzyński. Varsovio: La aŭtoro, 2002. 24 min; PAL-sistemo. La redaktoro akompanis la nepon de L.L. Zamenhof dum vizito en la brazila provinco de Esperantujo, precipe ĉe Bona Espero. € 18,00

Poŝtkarto "Terglobo". Rotterdam: UEA, 2003. 10,5x15cm. Bildo de la terĝlobo kun verda stelo kaj ĉirkaŭ ĝi rondo de homoj. € 3,00 (por dekopo). Triona rabato ekde 3 dekopo.



★ **LITOVIO:** En litovlingva bulteno *Valstybes zinios* (Informoj de la ŝtato), aperanta trifoje semajne, kie estas publikigataj leĝoj, internaciaj kontraktoj kaj aliaj normaj dokumentoj, aperis internaciaj normigaj dokumentoj pri doganaj aferoj. Inter ili estas ankaŭ listo de lingvoj uzeblaj en doganaferoj kaj iliaj mallongigoj. Inter la lingvoj estas ankaŭ Esperanto. Sekve, Esperanto estas agnoskita kaj povas esti uzata en dogandokumentoj.

★ **AŬSTRIO:** En la renoma germana Eldonejo Beck (Bek) aperis 199-paĝa libro *Litauen* (Litovio). Sur la paĝo 45 oni trovas preskaŭ unupaĝan artikolon pri Esperanto. La libro aperis en 2002, tamen la Universala Kongreso de 2005 en Litovio estas en ĝi menciita.

★ **SVEDIO:** La retejo de Sveda Esperanto-Federacio registris ankaŭ dum la jaro 2003 pli ol 1 milionon da vizitoj. Inter la 1-a de januaro kaj la 31-a de decembro ĝiaj paĝoj altiris ekzakte 1 050 877 vizitojn. La paĝoj vekas ne nur scivolemon, sed ankaŭ konkretajn membrigojn aŭ mendojn de lernolibroj de Esperanto.

★ **HISPANIO:** La 16-an de januaro oni ekprojekciis en diversaj hispanaj kinejoj filmon *La Pedalaŭto*, en kiu Esperanto ludas gravan rolon. La protagonisto, la hispana aktoro Alex Angulo, estas

profesoro de Esperanto kaj plurfoje parolas ĝin. Eĉ estas sceno pri klaso de Esperanto, kies lernantoj portas la verdan emblemon kaj la protagonisto diktas tekston en Esperanto. Sur la celo ke la prononcado estu kiel eble plej bona, la reĝisoro de la filmo sin turnis al Hispana Esperanto-Federacio, kiu pere de du aktivaj membroj helpis en la tasko, instruante Esperanton. Hispana E-Federacio en sia retpaĝo www.esperanto-es.net plurfoje informis pri la evento.

★ **RUSIO:** La prezidantino de la 111-jara Societo Espero Anna Bukteviĉ donis intervjuon por *Smena*, populara gazeto en Peterburgo. La tekston pri Esperanto konsistigas krom la intervjuo ankaŭ imponaj frazoj de la ĵurnalisto (kredeble, ŝatanta sensaciojn). Eblas legi pri milionoj da parolantoj kaj pri brilaj perspektivoj de Esperanto en Eŭropa Unio.

★ **ĈINIO:** La 12-an de januaro 2004 okazis en la Informa Oficejo de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio gazetara konferenco pri la 89-a UK en Pekino. Ĉeestis ĝin pli ol 80 raportistoj el la Xinhua-a Novaj-Agentejo, Ĉina Centra Televido, Ĉina ĵurnalo, Ĉina Interreta Informa Centro kaj aliaj pli ol 40 amas-komunikiloj, inkluzive tiujn de aliaj landoj. La detaloj troveblas ĉe la retpaĝaro: <http://www.amesp.com>

Fake

★ **ĴURNALISTOJ:** Tutmonda Ĵurnalista Asocio (TEJA), 55 jarojn post la fondo en 1948, estis la 31-an de decembro 2003 malfondita. Dum jardekoj TEJA estis sub gvidado de precipe bulgaraj esperantistoj, ĝis disfalis la orienteŭropa socialisma bloko. En 1988 aperis la lasta n-ro de ĝia fakorgano *Internacia Ĵurnalisto*. En 1992 sub prezido de Stefan Maul la asocio estis refondita, reaperis *Internacia Ĵurnalisto*, ekfunkciis koresponda trejn-kurso por ĵurnalistoj sub gvido de Paul Gubbins. Sed baldaŭ TEJA ekstagnis, la revuo ne plu povis aperi pro manko de mono; el 130 membroj restis nur ĉ. 30 kaj la estraro proponis malfondon de "evidente superflua asocio".

★ **FILATELO:** La 23-an de januaro 2004 okazis en Vilno kunsido de la ŝtata komisiono pri eldonado de poŝtmarkoj. Krom aliaj aferoj ĝi traktis proponon de Litova Esperanto-Asocio pri eldono de poŝtmarkoj kaj aliaj filatelaĵoj lige kun la 90-a UK en Vilno en 2005. La decido de la komisiono estis enigi proponon de Litova Esperanto-Asocio en la eldonplanon por 2005. LEA proponis eldoni poŝtmarkon pri la 90-a UK, kolekton de poŝtmarkoj, specialajn koverton, poŝtkarton kaj aerogramon, stampilojn de la unua tago k.a. En Litovio kutime estas eldonataj nur 25 novaj poŝtmarkoj jare.

★ **VERKISTOJ:** Esperantlingva Verkista Asocio (EVA, fondita en 1983) havas novan komitaton. Kiel prezidanto estis elektita Mauro Nervi, vicprezidanto Tomasz Chmielik, sekretario Spomenka Ŝtimec, kasisto Tomasz Chmielik. En la komitato krome membras Anna Löwenstein, Trevor Steele, Paul Gubbins kaj Mao Zifu. La nova pago de EVA estas www.verk.org. Kiel dum la pasintaj jaroj ankaŭ ĉi-jare EVA kandidatis William Auld por la Nobelpremio pri literaturo.

★ **INTERLINGVISTIKO:** La kvara sesio de Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznań, Pollando) okazis inter la 01-06.02.2004. Doc. Michel Duc Goninaz gvidis la partoprenantojn tra la problemoj de gramatiko kaj Esperanta leksikografio. La studentoj akiris konojn pri la historio de nia movado dank' al Aleksander Korjenkov. Ilona Koutny traktis temojn de aplikata lingvistiko kaj de pragmatiko, al kiu kontribuis ankaŭ d-ro Zbigniew Galor. La tradicia renkontiĝo altiris ankaŭ la reprezentantojn de la vigliganta junulara movado el Poznań. Ne mankis kantoj, gitarludo kaj humura versio de la scienca programo. UAM lanĉos novan

3-jaran interlingvistikan programon en septembro.

★ **TEATRO:** En 2003 Bulgara Esperanto-Teatro festis sian 45-an jubileon. Tiu ĉi unika profesia E-teatro unuafoje prezentis publike la 19-an de majo 1958. La nacie kaj internacie konataj geaktoroj kaj reĝisoroj surscenejigis en ĉiuj mondo-partoj dekojn da originalaj kaj tradukitaj verkoj. Pri la jubileo de BET aperis artikoloj en renomaj bulgaraj ĵurnaloj. En la revuo *Teatro*, la faka revuo de la bulgaraj teatroj, aperis ilustrita artikolo de la "motoro" de BET Belka Beleva, kiu enhavis plurajn faktojn el la historio de

BET. La revuo *Za jenata* publikigis emocian artikolon de Venelin Mitev kaj plurajn fotojn pri la jubileoj, emfazante kaj ties meriton por la diskonigo de la bulgara kulturo eksterlande, kaj iliajn klopodojn popularigi la Esperantan kulturon en Bulgario.

★ **RETA TELEFONADO:** Ekzistas iloj por telefoni interrete, ekzemple *Skype* (Skajp) ĉe www.skype.com. Bezonata estas PC kun Vindozo (prefereble XP) kaj mikrofono. Emilio Cid verkis Elingvan tt-paĝon por helpi al elŝuto kaj konfigurado de la iloj: <http://www.esperantointernacia.hpgig.com.br/skype.htm>.



La geaktoroj de BET post provludado dum la 54-a IFEF-kongreso en Plovdiv, Bulgario: T. Jurkov, V. Zjumbjuleva, I. Zlatarev, N. Uzunov, B. Beleva kaj D. Goranova.

Oficiala informilo



NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Rusio: Brigitta Loose. **Danio:** Villads Bugge; Bang Henriksen.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

Amiko (min. \$10): **Aŭstralio:** O. Loneragan. **Subtenanto** (min. \$ 25): **Hispanio:** L. E. Hernández García.

Patrono (min. \$ 100): **Hispanio:** R. Uruëña de Hernández.

DONACIOJ 2003 (EUR)

Ĝis la 31-a de decembro

Ĝenerala kapitalo: **Nederlando:** Y. Weidema 4 537,80. *Sumo tutjara:* 19 364,77.

Kapitalo Afriko: **Germanio:** Stiftung Mondo Esperanto 100,00. **Nederlando:** A. Nonima 7 000,00; A. J. ten Hagen 1 000,00. *Sumo tutjara:* 21 710,59.

Konto Afriko: **Francio:** J. Rapley 100,00. **Germanio:** Stiftung Mondo Esperanto 350,00. **Hispanio:** R. Uruëña 200,00. **Nederlando:** G.N.M. van Dijk 50,00; F. H. Kat 50,00; D. Krombeen 100,00; W.T.J. Zeiss 50,00. **Svedio:** J. Hammarberg 10,87. **Svislando:** M. Grosjean 47,62. *Donacoj dum*

UK: 500,00. *Sumo tutjara:* 3 947,94.

Fondaĵo Ameriko: **Finnlando:** T. Sormunen 43,50. *Sumo tutjara:* 1 787,66.

Fondaĵo Kanuto: **Luksemburgio:** B. Moon 115,00. **Nederlando:** A.E. Beuzenberg 50,00; F. H. Kat 50,00; A. E. Moerbeek-Prins 100,00. *Sumo tutjara:* 2 761,30.

Konto Espero: **Aŭstralio:** J. Bishop 30,00. **Belgio:** kolekto el Antverpeno: 278,12. **Francio:** La grupo de Bourges 20,00; J. Rapley 100,00. **Hispanio:** L.E. Hernández García 100,00; R. Uruëña 300,00. *Sumo tutjara:* 3 635,80.

Volontula Fondaĵo: **Finnlando:** S. Mynttinen 26,00. **Nederlando:** A. Beuzenberg 50,00; G. Peet 26,00. *Sumo tutjara:* 469,97.

Ĝenerala kaso: **Nederlando:** G.F. Makkink 892,00. **Svislando:** A. Nonima 98,41. *Sumo tutjara:* 2 668,64.

Konto Etiopio: **Hispanio:** P. Juliá 53,87. *Sumo tutjara:* 1 031,46.

Konto Edukado/Wüster: **Germanio:** I. Bociort 100,00. *Sumo tutjara:* 459,50.

Al ĉiuj tre horan dankom! UEA



Raporto pri Esperanto-agado dum la

Monda Socia Forumo

(Mumbajo, Barato, 15-22 jan 2004)

Aya el Filipinoj, sur la apuda foto, promesas en la angla al Ranganayakulu, ke venontfoje ili babilados en Esperanto!

Inter tiom da interesaĵoj, jen la plej interesa, deklaris Ŝjam Mohite, advokato (sube maldekstre), vizitante la budon de Universala Esperanto-Asocio dum la Monda Socia Forumo (MSF) en Mumbajo, Barato.

S-ro Mohite estis inter la pli ol mil homoj kiuj scivolis pri nia afero. Ja imponis la gamo de homoj kiuj volis scii pri Esperanto: agrikulturistoj, advokatoj, dommastrinoj, emeritoj, instruistinoj, ĵurnalistoj, monaĥinoj, pastroj, profesoroj, studentoj, tradukistoj, kaj plej videble, ĉiuspecaj aktivuloj kontraŭ iu aŭ alia nejusteco en la mondo. Por ĉiuj ĉi homoj, kaj plurlingveco kaj lingvaj malsimetrioj estas ĉiutagaĵaj realaĵoj – realaĵoj des pli frapaj en tiu ĉi grandega evento, al kiu inter la 16-a kaj 21-a de januaro 2004 venis 80 mil homoj de 2 660 organizaĵoj el 132 landoj!

Agnoskante la gravajn lingvajn barilojn, tiu ĉi MSF havis 13 oficialajn lingvojn! Tamen, ni ĉe la UEA-budo, sufiĉe ofte aŭdis la malkontenton de la partoprenantoj pri lingva ekskludo.

Nesurprize do, ke la vizitantoj al nia budo tre interesiĝis pri lingva demokratio kaj tuj konsentis pri la bezono de facila kaj neŭtrala lingvo. *Jen Esperanto!* ni diris – *Alia Lingvo Eblas!* ni sloganis, ĉante la sloganon de la MSF *Alia Mondo Eblas!*

La respondoj kuŝis en la gamo: *Ĉu vere? Bonvolu diri plu; 117-jara lingvo! Kial mi ne jam aŭdis pri ĝi?; Ŝajnas hispaneska – kial vi opinias, ke la hispana estas neŭtrala?; Tro eŭropeca, ĉu ne, ĉu ĝi fakte taŭgus por ni neeŭropanoj?; Kial ni bezonas plian lingvon:*



ĉu ne jam sufiĉas la ekzistantaj? Tamen, dirindas, ke frape malmulte da vizitintoj suferis pro tio kion ni povas Pironeske nomi La Kliša Malsano: Jam venkis la mondon la angla! La kaŭzo, parte, estas ke ni budanoj – d-ro P. V. Ranganayakulu de Tirupatio, s-ro Nischad Salam de Puneo, kaj mi de Hajderabado – parolis kun la vizitantoj ne nur en la “ĉiopova” angla, sed ankaŭ en la hindia, kanara, malajalama, maratha, telugua kaj la urdua. Efektive, multaj baratanoj vizitis la budon ĝuste pro la fakto, ke ni videble aspektis barataj! Kamparanoj, precipe, ĝojegis babiladi en siaj propraj lingvoj pri ekzotaĵoj kiel Esperanto. Se temas pri ekzotaĵoj, ni sukcesis aldoni la francan al nia lingvaro!

Tiun lastan, danke al s-ro Guy Barbier, kiu subite aperis ĉe la budo kaj anoncis, *Saluton! Mi lernis Esperanton antaŭ du monatoj.* Kaj Guy jam parolis Esperanton pli bone ol la anglan! Li do rapide iĝis nia *Elmontraĵo A* (kiel oni diras en la kortumo!) – jen demonstro de kaj la facileco kaj la utileco de Esperanto....

Multaj venis poste nur por kontroli la lingvon de nia kunbabilado. Krome, ĉiutage du aŭ tri homoj venis al la budo, malkaŝante ke ili iam lernis Esperanton, kaj mirante, ke la lingvo ankoraŭ vivas. Bedaŭrinde, pro nia malmulto, kaj pro la

konstanta fluo de vizitantoj, ni tute ne povis partopreni en iu ajn el la pli ol mil seminarioj kaj kunsidoj kiuj okazis samtempe en la MSF.

Al ĉiuj kiuj vizitis nian budon, ni disdonis flugfolion unupaĝan. Ni adaptetis la retpaĝon de oftaj demandoj ĉe la *Multlingva Inform-centro pri Esperanto* (<http://www.esperanto.net/info/baza.en.html>). Ni ĝisdatigis la retadresojn tie, kaj aldonis kontaktinformon pri Federacio Esperanto de Barato (FEB). Tion ni ankaŭ faris dum la Azia Socia Forumo en januaro 2003.

Ni multoblis la seslingvan flugfolion de SAT (<http://satamikarohm.free.fr/esperanto/soc/seslingva.pdf>), kiu enfokusigis lingvan demokration. Sufiĉe da eksterlandaj

vizitantoj interesiĝis pri ĝi. Krom tiuj ĉi, ni montris la viklecon de Esperantujo per revuoj, libroj, lernolibroj kaj vortaroj. Multaj konvinkigis, ke ne temas pri ia privata ludo. Interese, multaj vizitintoj, inkluzive nian advokaton Mohite, revenis kun siaj geamikoj por ke ni prezentu nian aferon ankaŭ al ili!

Siajn retpoŝtadresojn lasis multaj vizitantoj. La tasko dum la venontaj semajnoj estas kontakti ilin, kaj doni la lernormedojn tra la reto. Efektive, informas min amiko Ranganayakulu, ke filipinano Aya – politika aktivistino kiu ĉeestis la MSF-on – ĵus lin kontaktis, esperante, ke venontfoje ili povos interparoli en Esperanto!

D-ro A. Giridhar Rao
(drigidhar@eth.net)

Ĉu la movado malbonfartas?

La direktoron de la pacmuzeo de Samarkand, fiŝkaptiston el Islando, mondkonatan bulgardevenan akordionistinon, ĵurnaliston el Dagestano, germanan etnologinon, verkiston el Rusio, polan profesoron pri manaĝerado, germanan diplomaton, pranepojn de verkistino Marie Hankel, tri akademianojn: kie oni povas renkonti kune tiajn personecojn?

Kompreneble en la Internacia Festivalo, la tradicia arango por familioj, kiu festis ĉi-jare sian 20-an sesion. Inter la preskaŭ 200 partoprenantoj el 21 landoj ĉeestis amaso da tre diversaj kaj tre interesaj homoj.

La temo? *Rusio* – sed oni ja ne venas pro la temo, oni venas por renkonti homojn. Kaj babilu kun ili – pri ajna temo, en ajna momento. Tial oni malmulte protestas se oni devas vicostari por ricevi sian manĝon (ĉu por redoni iom de la sietempaj kutimoj de Rusio kaj apudaj teritorioj?).

Malfreue dum la nokto restis multaj homoj, kantantaj, trinkantaj, ludantaj sociajn ludojn aŭ simple kune babilantaj. La *knajpo* (etosplena tipa gastejo) estas ĉiam la plej forta punkto de la IF, ĝi funkcias ekde la mateno ĝis... ni diru fruege matene (aŭ malfruege nokte).

Ankaŭ la silvestra balo estas unu el la kulminoj de la arango. Malfermo per polonezo nun fariĝas tradicio. Bonega etoso, sinseka festo de la diversaj novaj jaroj (laŭ la horzonoj) kaj kompreneble dancado, ĝis la 6-a matene.

Kaj la temo? Estis interese aŭdi diversajn punktojn pri Rusio, ekzemple de germano, kiu estis studento en Leningrado en la brejnjeva epoko, aŭ de belgino, kies edzo estas rusa, kaj kiu klopodis reliefigi la kulturajn diferencojn inter Rusio kaj okcidenta Eŭropo. Estis ankaŭ bona eblo informiĝi pri landoj, kiuj refariĝis sendependaj, kiel ekzemple Latvio. Michael Bronŝtejn prezentis sian eldonotan libron *Dek jaroj de la vivo de kolonelo Postnikov*, kiu rakontas pri rusa pioniro de la movado, kaj en kiu li imagas konversaciojn inter Postnikov kaj Zamenhof sur la ŝipo al Vaŝingtono. Michael ankaŭ kantis, multe kantis. Ĉiun vesperon

ni havis rusan koncerton, kaj tiel ni plezure aŭskultis Oksana, Vitalik, Mikaelon, Jelenan, Ĵomart kaj Nataŝan.

Generale ne malpli sekvataj estis la ekstertemaj aktivajoj, ekzemple prelegoj pri korea ginsengo, pri spamoj, pri AIS, pri tiklaj lingvaj demandoj, pedagogia seminario pri edukado al demokratio, kaj dankursoj, tablotenisa turniro, promonadoj tra la urbo... La abundo de programoj (foje okazis paralele tri aŭ kvar prelegoj) havis malavantaĝon, ke kelkajn interesajn prelegojn ĉeestis nur manpleno da homoj.

Majstre ĉiĉeronis d-ro Werner Bormann la ekskurso al la bela hansa urbo Lübeck, konata pro sia simbola enirpordego, sed ankaŭ pro siaj marcipanoj: ni tiel tagmanĝis en la fama marcipanejo, vizitis ĝian muzeon, trinkis specialan marcipanan kafon kaj ankaŭ rigardis la tre interesajn monumentojn: la malnova urbodomo, la belegaj fasadoj de la domoj en la centra strato, la katedralo kaj aliaj preĝejoj, kaj, ni ne forgesu ke ĝi estas la urbo de Thomas Mann, ankaŭ la t.n. domo *Buddenbrook*.

La mastro de IF, Hans-Dieter Platz, konata al ĉiuj kiel HDP, rajtas fieri pri sia realigaĵo, kaj aparte ĝoji, ke lia iniciato plensukcese daŭras.

IF naskiĝis kiam kelkaj kutimuloj de IS (Internacia seminario) konstatis, ke ili estas tro maljunaj por IS, kaj ke tamen ili ŝatus plusilvestrumi kun geamikoj en simila etoso. La bona ideo fari kune la du arangojn (kiel oni provis en fruaj IF) tamen apenaŭ estas realigebla, pro la granda nombro da partoprenantoj: ne eblas trovi taŭgan ejon por tiom multe da homoj (ekzemple ĉi-jare, 200 en IF, 250 en IS). Sed IF altiras pli kaj pli da homoj... kaj nun, en Germanio, okazas ne nur IF kaj IS, sed



jam la duan fojon okazis paralele tria renkontiĝo, organizita de la asocio EsperantoLand – nova nomo por la tradicia Esperanto-Centro, iam en Paderborn. La dua ‘Novjara Renkontiĝo’ en la urbeto Tecklenburg apud Münster kunigis ĉi-foje 60 partoprenantojn, kiuj ĝuis varian kulturan kaj kursan oferton, muzikajn prezentojn; eblis korse kanti, lerni ĵumeĥo-terapijon kaj gimnastikon, fari surbostonajn pupojn... En la prelega programo prezentiĝis i.a. la Elektronika Bibliografio de Esperanto-Artikoloj.

Kion konkludi? En la sesdekaj jaroj okazis IS, kiu pene kunigis inter 50 kaj 80 partoprenantojn. Nuntempe eblas okazigi samtempe en la sama lando tri aranĝojn, kun riĉenhava programo, kaj venigi entute pli ol 500 esperantistojn.

Kiu diris, ke la movado malbonfartas?

Claude Nourmont




Sveda vespero dum la jubilea Internacia Festivalo, tradicia aranĝo por E-familioj.

Forpasoj

Roger DESPINEY (1907-2003), delegito, prez. de Pariza Federacio, sideja direktoro de UFE (1978-1987) kaj ties honora prezidanto.

Hans J. BROGWARDT (1924-2003), delegito pri humanismo kaj homaj rajtoj (1991-2003) en Stralsund (Germanio), forpasis pasintan novembron.

Hayrettin DURAL (1921 - 2003), kolonelo, fakdelegito pri lingvoj en Istanbul (1996 - 2003), mortis la 28-an de novembro 2003 en Ankara (Turkio).



Johano GIBAU

(? - 2002), librotrenisto, delegito en Le Havre, Francio, dumviva membro, forpasis la 23-an de septembro 2002.

Martin HOWARD (1939-2003), delegito kaj fakdelegito pri kvakerismo (1998-2003), forpasis en Braintree (Britio).

Luisa la MANNA (1924-2004), fakdelegito pri blindulaj aferoj (1989-2003), mortis januare en Singen (Germanio).

Raoul-Georges MELO (1908 - 2004), delegito kaj fakdelegito pri filatelo, korespondado, parapsikologio (1993-2003), forpasis jarkomence en Bellerive-sur-Allier (Francio).

Josef MURJAN (1920-2004), delegito kaj fakdelegito (1979 - 2001) naskiĝinta en Pollando, forpasis en Bat-Jam (Israelo) la 31-an de januaro. Esperanton li lernis en 1937 kaj instruis ĝin en multegaj kursoj. En E-Ligo de Israelo li aktivis kiel komitatano, redaktoro de la revuo *Nia Ligilo*, LKK-ano de UK en Tel-Avivo. Li iniciatis, kompilis, redaktis plurajn E-eldonadojn, inter ili *Antologio de Hebrea poezio* (1987). Li verkis *Praktika vortaro hebrea-Esperanta* (1989) kaj *Plena vortaro Esperanta-hebrea* (2000).



Marjorie ELLYARD (1913-2003) membro de 1976, delegito en Canberra (1979-2000), mortis la 23-an de decembro en Canberra (Aŭstralio). Ŝi estis sekretario de Aŭstralia E-A dum ŝia edzo, Samuel W.G. Ellyard (forpasis en 1983), la kasisto. Profesia instruistino ŝi multe instruis E-on kaj laboris en la Ekzamena Komitato de AEA. Unu el ŝiaj plej konataj agadoj estis kreo kaj eldono de populara vortlud-kompleto.



Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Cent jaroj (1896-1996) da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Burmann. Rotterdame: UEA, 1997. 111 p. 86 fotoj kaj pluraj tabuloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: € 7,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



LA PLEJ KONATA LIBRO PRI EKA TEMPOUZO, NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Rotterdamo: UEA, 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj* n-ro 2. 53 p. Prezo: € 2,10. Triona rabato ekde 3 ekz.



TERMINOLOGIO EN PRAKTIKO

TERMINOLOGIA GVIDILO. Heidi Suonuuti. El la angla trad. Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke. Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92 9017 057 3. 21cm. Prezo: € 5,40. Triona rabato ekde 3 ekz.

Jen gvidlibreto por ĉiu kiu serĉas kompaktan enkondukon al la principoj kaj metodoj de praktika terminologio. Ĝi estas bazita sur la aktualaj ISO-normoj, kies esenco ĝi prezentas klare kaj koncize per facile kompreneblaj ekzemploj.



Krucenigma konkurso

Nova krucenigma aperos en la venonta numero. Solvo el la novembro krucenigma: Antaŭe kion vi devas, poste kion vi volas.

La solvon sendis: Ahmed Chourar, Algerio; Ahmed Chourar, Francio; Akada Joŝihisa, Japanio; André Amice, Francio; Angus Wilkinson, Britio; Ann-Louise Åkerlund, Svedio; Astrid Birkbak, Danlando; Celio A.S. Brandão, Brazilo; Christian Rivière, Francio; Christoph Brandes, Germanio; Cornelius Neal McKown, Usono; Daniel Luez, Francio; Denise Hubert, Francio; Dezusto Frankleno, Nederlando; Dieter Dungere, Germanio; Dieter Rooke, Svislando; E. James Lieberman, Usono; Edmund Grimley Evans, Britio; Erkki Kemppainen, Finnlando; Esperanto-grupo Konstanz, Germanio; Ester Olsen, Norvegio; František Štoviček, Ĉeĥio; George Otto Vaske, Brazilo; Germain Pirlot, Belgio; Gerrit Brons, Nederlando; Grethe Kvist, Danlando; Grozdenka Filipova, Bulgario; Gwenda Sutton, Nov-Zelando; Hamzeh Shafiee, Irano; Hayasi Kaneyuki, Japanio; Hazel Green, Aŭstralio; Hoang Ngoc Boi, Vjetnamio; Irene Szűcs, Rumanio; J. Pauluk, Brazilo; Jackie Huberdeau, Francio; Jean-Luc Tortel, Francio; Jean-Marc Fratar, Francio; Jean-Marie Ries, Luksemburgio; Jean-Pierre Garden, Francio; Jean-Pierre VandenDaele, Belgio; Jean-



Thiery von Büren, Svislando; Jimes Milanez, Brazilo; Jiří Patera, Ĉeĥio; Joyce Bunting, Britio; José Mauro Progiante, Brazilo; Julien Ducrocq, Francio; Jurij P. Kivajev, Rusio; Júlia Sigmond, Rumanio; Karin Lencki, Germanio; Kay Andersen, Aŭstralio; Kees Neeft, Nederlando; Keyhan Sayadpour, Irano; Kitty Sicherman, Israelo; Krystyna Barbiarz, Pollando; Leñče Efremova, Makedonio; Lucien Giloteaux, Francio; Malcolm Jones, Britio; Manjo Clopeau, Francio; Manuel Casanoves, Hispanio; Marc Bavant, Francio; Marcel Guery, Francio; Martin Purdy, Nov-Zelando; Maurice Gourichon, Francio; Mihailo Nešić, Serbio-Montenegro; Milan Neubeler, Slovakio; Milan Smělý, Ĉeĥio; Mo Zhi-Xiong, Ĉinio; Navin Lal Shrestha, Nepalo; Otto Gessner, Germanio; Paul Lafont, Francio; Pentti Makkonen, Finnlando; Pierre Royer, Francio; Renato Petrović, Serbio kaj Montenegro; Robert Bogenschneider, Germanio; Roland Cuenot, Francio; Roland Larsson, Svedio; Roland Thibault, Usono; Roma Thorsen, Danlando; Ronald Gates, Aŭstralio; Siniša Veličković, Serbio kaj Montenegro; Tatiana Auderskaja, Ukrainio; Theo Pfeifer, Germanio; Tooru Aoyama, Japanio; Valentino Barocci, Italio; Valentin Melnikov, Rusio; Vicente Durco, Brazilo; Vladimir Gakalenko, Ukrainio; Vlastimil Kočvara, Ĉeĥio; Wanderley Vieira, Brazilo; Werner Bormann, Germanio; Zdeněk Hršel, Ĉeĥio. **La libropremion gajnis:** Jackie Huberdeau, Francio. Koran gratulon al la gajninto!

serio de utilaj broŝuroj



Esperanto post la jaro 2000. Aleksander Korjenkov. Provo distingi bazojn por nia estonta agado. Rotterdam: UEA, 1998. 18p. 21cm. € 2,10. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



La spirito de Esperanto kaj la "samideanaj" malamikaĵoj. Ignat Bocior. Eseo premiita en la Belartaj Konkursoj. Rotterdam: UEA, 1999. 12p. 21cm. € 1,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Zamenhof, hodiaŭ. Andrea Chiti-Batelli. Provo aktualigi la homaranismon sur lingvo-problema kampo. Rotterdam: UEA, 1999. 20p. 21cm. € 2,10. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



La strategio de Esperanto en la nova jarmilo. Gian Carlo Fighiera. Pri la celoj de la agado por kaj por E-o, pri la problemaro komunuma/movado, la rolo de UEA kaj kritikoj pri ĝi. Rotterdam: UEA, 2000. 24p. 21cm. € 2,10. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



En 2003 141 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj specialan donaceton, kiu en 2003 estis terglob-forma poŝlumileto. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.




ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 2004?

POR CERTIĜI, KE ANKAŬ EN 2004 VI AKURATE RICEVOS LA REVUON ESPERANTO, NE FORGESU PAGI VIAN KOTIZON. KOTIZTABELO APERIS EN LA FEBRUARA NUMERO, LEĜEBLAS ĈE WWW.UEA.ORG AŬ PETEBLAS DE LA CO. DANKONI!

KLASIKA VOJAĜLIBRO

Antaŭ 700 jaroj Marko Polo vojaĝadis vaste de Zanzibaro ĝis Ĉinio, landoj plenaj de mirindaĵoj por tiutempa eŭropano. Liaj spertoj restis influa fonto de informoj kaj inspiro tra jarcentoj. Per sia verko Marko Polo kreis ponton inter du ĉefaj kultursferoj de la tiama mondo. Ĝia Esperanto-versio, en verna traduko kaj klera prizorgo de Daniel Moirand, trovis naturan lokon en la serio Oriento-Okcidento.




LA LIBRO DE LA MIRINDAĴOJ AŬ LA PRISKRIBO DE LA MONDO. Marko Polo (1225-1324). Esperantigis Daniel Moirand. Rotterdam: UEA, 2001. 445p. 21cm. Ilus. Serio "Oriento-Okcidento", n-ro 34. Prezo: € 33,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KSTAKTO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KSTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 2004 **KSTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFA 2004

Aŭstralio	33 dolaroj	Francio	20 eŭroj	Nederlando	20 eŭroj
Aŭstrio	25 eŭroj	Germanio	20 eŭroj	Norvegio	160 kronoj
Belgio	20 eŭroj	Hispanio	20 eŭroj	Pollando	10 eŭroj
Brazilo	10 eŭroj	Israelo	16 eŭroj	Portugallio	20 eŭroj
Britio	14 pundoj	Italio	20 eŭroj	Svedio	185 kronoj
Danio	155 kronoj	Japanio	2500 enoj	Svislando	30 frankoj
Finnlando	20 eŭroj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĵungalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.), 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. € 4,80. Triona rabato ekde 3 ekz.

LA 89-A EN ĈINIO!



Pekino, Ĉinio
24-31 julio 2004

GLUMARKOJ (5x4 cm) por la ĉi-jara UK jam pretas. 12-peca folio kostas € 1,20. Triona rabato ekde tri ekz.

UNUA BULTENO haveblas en ajna petota kvanto ĉe la Centra Oficejo.

DUA BULTENO ekspediĝis al aliĝintoj en februaro.